

1973 septembro

66-a jaro


n-ro 813 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



**SURPRIZA
KONGRESO
EN BEOGRAD**



Vi trovos

preskaŭ la tutan septembran numeron (nome tiun, kiun vi nun tenas en la manoj — ĝi aperis, ho ve, nur komence de oktobro) dediĉita al la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto. Pro la nekutime ampleksa raporto, la aliaj regulaj rubrikoj reaperos nur en la venonta numero. Same nur tie aperos raportoj pri la ĉi-jaraj TEJO-kongreso en Sarajevo, blindula kongreso kaj infankongreseto en Beograd, Postkongreso en Ateno, fakaj kunvenoj beogradaj k.c.

La plej grandan parton de la kongresraporto prizorgis ĉi-foje s-ro Simo Milojević, konata precipe kiel unu el la redaktoroj de "Kontakto". Pro livero de bildoj ni precipe dankas al s-ro Davor Grgat (paĝoj 143, 146, 151 kaj kovrilo) kaj s-ro Peter Schilperoord (p. 155 kaj 157 sube).

Enhavo

- 141 Surpriza kongreso en Beograd
- 141 Kongresa Rezolucio
- 142 La Solena Inaŭguro de la 58-a UK: Mamuta, sed prestiĝa
- 145 Festparolado de d-ro J.C. Wells: Por amikeco — kies antaŭkondiĉo estas komuna lingvo
- 147 Organiza diskuto: La laborkunsidoj
- 148 Dua Ĝenerala Kunveno de UEA: Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko
- 150 Debato: Esencas nova enhavo
- 151 Teatra Vespero: Nostalgiaj pensoj pri IAT
- 152 Kongreslanda vespero: Delica revuo de jugoslavia folkloro
- 154 Varia kaj internacia vesperoj: Troa oscilado de kvalito
- 155 La 26-a sesio de ISU: Impona nombro da aŭskultantoj
- 156 Sukcesa Oratora Konkurso; Magra belarta rikolto
- 157 Akceptoj, festaj kaj distraj aranĝoj: Amasa — kaj kontenta partopreno
- 158 Junularaj aranĝoj dumkongresaj: Tio tamen ne estas TEJO
- 158 La Solena Fermo: La lasta akto
- 159 Oficiala informilo n-ro 470: Kotizoj por 1974
- 160 Anoncetoj

La kovrilo

Kontraŭ beograda fono (maldekstre vidiĝas de malantaŭe la kongresejo Sindikata Domo) alparolas la 58-an Universalan Kongreson s-ro Veljko Milatović, prezidanto de la Federacia Konferenco de la Socialista Unuiĝo de Jugoslavio kaj oficiala reprezentanto de la Alta Protektanto de la 58-a UK, Josip Broz Tito. Ekstraktoj el la tre interesa parolado de s-ro Milatović aperas sur la paĝoj 142-143.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

SURPRIZA KONGRESO EN BEOGRAD

Klopodante relative baldaŭ post la fino de la 58-a UK doni ĝeneralan pritakson de ĝiaj laboraj kaj aliaj aspektoj, oni kiel en ĉiuj similaj kazoj, riskas dudi-mensian raporton, ĉar — nur post pli granda tempo-paso oni povos doni senapelacian juĝon. Tamen, se oni jam nun devus karakterizi la Beogradan Kongreson per unu sola vorto, ni decidiĝas por la epiteto *surpriza*.

Surpriza kongreso ĝi estis pluraspekte. Antaŭ ĉio, kun 1638 aliĝintoj, la 58-a UK estis unu el la plej malgrandaj kongresoj dum la lastaj dudek jaroj, malpli granda eĉ ol la unua UK en Jugoslavio, tiu en 1953 en Zagreb. Al tiu unua surprizo grave kontribuis la fakto, ke al la Kongreso venis ne nur malmultaj orienteŭropanoj, sed eĉ jugoslavo mem ne svarmis inter la aliĝintoj. Aliflanke, al Beograd venis surprize granda nombro da kongresanoj el tiel foraj landoj kiaj estas Usono kaj Japanujo.

La beograda aŭgusto, kies kutima temperaturo anticipis fortimigis verŝajne centojn da aliĝintoj, surprizis la kongresanojn per agrable freŝa semajno. La Sindikata Domo, en la koro mem de la urbo, estis sendube unu el la plej taŭgaj kongresejoj en kiuj ni ĝis nun gastis. Tiurilate, tamen, estis feliĉo, ke al la Kongreso ne aliĝis pli multaj partoprenantoj.

Por multaj kongresanoj estis surpriza ankaŭ la komforto, kiun oni je moderaj prezoj ĝuis eĉ en duaklasaj hoteloj, sed — por multaj aliaj, la malkomforto de la studentaj loĝejoj estis la plej amara sperto de la kongresa semajno. Pluraj kongresaj aranĝoj havis surprize altan nivelon (Jugoslavia Vespero, Balo, Bankedo), aliaj surprizis per sia malbona kvalito (Teatra Vespero, Junulara Tago).

Tamen, konsiderante la fakton, ke la plimulto de kongresanoj venis el la okcidentaj landoj, la ĉefa surprizo estis konatiĝo kun tute alia vivkoncepto, praktikata en Beograd kaj eble ankaŭ en la tuta lando. Temas pri la ĝenerala rilato al la vivo kaj laboro: jugoslavo unuavice ĝuas la vivon, kaj, se restas iom da tempo — ili ankaŭ laboras; en la okcidenta mondo oni ja ĉefe laboras, kaj — se restas iom da tempo, oni ankoraŭ klopodas ĝueti la vivon.

Reeĥoj ekster la Kongreso

La Kongreso logis al sia Inaŭguro surprize grandan — rekordan nombron da eminentuloj ekstermovadaj. Sed aliflanke, la ĝenerala reeĥo de la Kongreso en la lando mem, kaj aparte en la jugoslavia ĉefurbo, estis tute minora, interalie ankaŭ pro la fakto, ke en la urbo videblis nenia signo, ke en ĝi okazas la Kongreso. Kvankam ni en la oktobra n-ro de tiu ĉi periodaĵo intencas amplekse revui la gazetaran, radio- kaj televidan reeĥojn de la Kongreso, ne estas frue jam nun diri, ke oni tiurilate ne atendu pli bonajn rezultojn dum ni ankoraŭ konservas tiel diletante organizitan Gazetaran Servon kaj tiel malfrue okazantan — kaj unu solan — Gazetaran Konferencon. Ĝuste tiuj du kongresaj institucioj povus decide influi, ke oni ĉesu raportoj nur pri la pompo de la kongresaj inaŭguroj, kaj komencu sekvi la kongresajn laborojn.

LKK, kvankam ne sukcesinta mobilizi pli da kunlaborantoj el la loka Movado, tamen sukcese elturniĝis kaj certe per admirindaj streĉoj pleje kontribuis, ke la kongresa semajno pasu agrable kaj ke la 58-a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd restu en nia memoro kiel surprize sukcesa.

Kongresa Rezolucio

La 58-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Beograd de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1973, kun 1638 partoprenantoj el 42 landoj,

konstatas, ke la rezultoj de la Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro okazinta en Helsinki komence de junio 1973 signas plian paŝon al politika malstreĉiĝo en Eŭropo kaj donas esperon de pli intensa ekonomia kunlaborado kaj kultura interŝanĝado;

aparte aprezas la perspektivojn de amasa komunikado inter la eŭropaj nacioj kaj unuopuloj sur ĉiuj kampoj, ek de sciencaj kaj intelektaj interŝanĝoj, tra televido, radio kaj gazetaro, ĝis kultura turismo kun partopreno de la plej vastaj popoltavoloj;

atentigas, ke pro la granda nombro de naciaj lingvoj kaj lingvoj de naciaj minoritatoj en Eŭropo la Internacia Lingvo Esperanto, kiel neŭtrala instrumento de komunikado ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en mondaj kadroj, povas decide kontribui al la plena realigo de tia kultura programo;

sekve petas la registarojn de eŭropaj landoj kaj la kompetentajn instancojn de eŭropaj institucioj dediĉi seriozan atenton al la lingva aspekto de kulturaj interrilatoj kaj antaŭenigi la pluan disvastigon de Esperanto kaj ĝian aplikon en internacia praktiko.

MAMUTA, SED PRESTIĜA

“ — antaŭ ĉio esprimo de la evoluo kaj plifortiĝo de Esperanto en Jugoslavio kaj de la socia signifo, kiun nia lando atribuas al la disvastiĝo de Esperanto — por pli facila kaj pli rapida interkompreniĝo, por evoluo kaj plifirmiĝo de la amikeco en la mondo. ”

La inaŭguroj de la Universalaj Kongresoj estas tiu kongresa aranĝo, kiu tiras plejan atenton de la ne-esperantista mondo al niaj kongresoj kaj al la Esperanto-movado ĝenerale. Ĝuste tiu aranĝo ankaŭ pleje reeĥas ekster la kadroj de la Movado. Se ne estus tiel, eble eĉ indus preparoli reformojn de tiu mamuta solenaĵo, kiu ja en la plej bonaj kazoj daŭras minimume tri horojn. Sed tamen, pro la fakto, ke la inaŭguroj restas la kongresa aranĝo, al kiu venas amaso da oficialaj reprezentantoj de diversaj ŝtataj, sociaj kaj politikaj aŭtoritatoj de la kongreslando, samkiel diplomatiaj reprezentantoj de aliaj landoj kaj multaj gastoj, kaj aliflanke — pro la fakto, ke tiuj reprezentantoj kaj gastoj estas ĉiufoje aliaj, eĉ se oni dum pluraj jaroj sinsekve partoprenas la kongresojn kaj la inaŭgurajn solenaĵojn, — tiu aranĝo ĉiam restas premiera kongresprogramero. Ĝuste dank’ al tio, eĉ tiuj kongresanoj, kiuj, konsiderante la kongresojn turismaj aranĝoj, ne venas al la aliaj kongressesioj, nepre venas al la inaŭguroj.

La SOLENA INAŬGURO de la 58-a UK en Beograd logis al la kongreseja ĉefsalono de la Sindikata Domo ĉiujn gekongresanojn kaj rekordan nombron da kongreslandaj, diplomatiaj kaj urbaj reprezentantoj. La salono “Zamenhof”, kiel tradicie en niaj kongresoj nomiĝas la ĉefa ejo, estis plenplena, malgraŭ tio, ke la prezida podio disponigis lokon al plurdeko da oficialuloj, kaj la salono mem povas sidigi preskaŭ du mil homojn. La inaŭgurejo mem, kun sia ligne tegita interno, impresis feste eĉ sen apartaj ornamaĵoj, kiuj reduktiĝis al la vere impona, grandega kongresa flago kaj kelkaj florplantoj.

Post muzika programero, la Kongreson malfermis prof. Momčilo Šaponjić, prezidanto de LKK, kiu salutis la kongresanojn kaj bondeziris al ili la kongresan semajnon en Beograd. S-ro Eric Carlén, vicprezidanto de UEA, kiu prezidis la unuan parton de la Inaŭguro, unuavice esprimis bedaŭron, ke la prezidanto de la Asocio ne povas partopreni la Kongreson. S-ro Carlén salutis la oficialajn gastojn en la Inaŭguro, s-rojn: Veljko Milatović, prezidanto de la Federacia Konferenco de la Socialista Unuiĝo kaj reprezentanto de la Alta Protektanto — la Prezidanto de SFR Jugoslavio Josip Broz Tito, Blažo Jovanović, prezidanto de la Konstitucia Kortumo de Jugoslavio, Trpe Jakovlevski, ministro en la Federacia Registaro, Živorad Kovačević, vicprezidanto de la Magistrato de Beograd, Marijan Rožič, sekretario de la Federacia Konsilantaro de la Sindikata Unuiĝo de Jugoslavio, d-ro Mane Budisavljević, reprezentanto de Ruĝa Kruco de Jugoslavio, Milan Studin, reprezentanto de la Urba Konferenco de la

Socialista Unuiĝo de Beograd. S-ro Carlén salutis ankaŭ la ĉeestantajn membrojn de la Honora Komitato kaj aliajn gastojn, antaŭ ol transdoni la parolon al s-ro Veljko Milatović, reprezentanto de la Alta Protektanto.

S-ro Milatović, kies funkcio estas tre altranga en la jugoslavia soci-politika hierarkio, ĉar li prezidas la Socialistan Unuiĝon, kiu — ni diru tion pro la legantoj, kiuj ne orientiĝas en la jugoslavia soci-politika vivo — estas la ĝenerala amaspolitika organizaĵo kun plurmiliono membraro, alparolante la Kongreson interalie diris:

“Mi havas la honoron, en la nomo de la Prezidanto de la Socialisma Federacia Respubliko Jugoslavio, Josip Broz Tito, la protektanto de la 58-a Universal Kongreso de Esperanto, saluti la partoprenantojn de la Kongreso kaj ekdeziri kreaĵojn kaj fruktodonan laboron.” Memorigante la kongresanojn, ke tio ĉi estas “la dua fojo, ke la plej alta monda forumo de la Esperanto-movado” okazas en Jugoslavio (la 38-a UK okazis en Zagreb en 1953) kaj ke en Sarajevo ĵus finiĝis la 29-a Internacia Junulara Kongreso, s-ro Milatović plue diris:

“Ĉion ĉi ni ne klarigas per iaj niaj tradiciaj gastamo aŭ organizkapablo. Ni opinias, ke tio estas antaŭ ĉio esprimo de la evoluo kaj plifortiĝo de Esperanto en Jugoslavio kaj de la socia signifo, kiun nia lando atribuas al la disvastiĝo de Esperanto — por pli facila kaj pli rapida interkompreniĝo, por evoluo kaj plifirmiĝo de la amikeco en la mondo. La Socialisma Federacia Respubliko Jugoslavio, kiel vi scias, estas plurnacia lando, kaj la frateco, unueco kaj egalrajteco de la nacioj estas unu el la fundamentoj, sur kiuj baziĝas nia socialisma komunaĵo.” S-ro Milatović emfazis, ke tiu egalrajteco de la nacioj estis gvidlinio de la Jugoslavia Revolucio kaj restas la baza ideo de la jugoslavia enlanda kaj eksterlanda politiko. “En tiu kunteksto ankaŭ la kompleta egalrajteco en la uzo de la lingvoj de ĉiu nacio havas apartan signifon.”

En sia parolado, kiu cetere estis unu el la plej ampleksaj iam liveritaj de oficiala ŝtata reprezentanto en niaj kongresoj, s-ro Milatović plue skizis la bazajn principojn de la jugoslaviaj socio kaj politiko, emfazante la malfermitecon de la jugoslavia ŝtato kaj ĝiajn klopodojn kunlabori kun ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj, senrigarde al ilia socia sistemo. Ĉio ĉi, laŭ s-ro Milatović, “estas la sociaj kondiĉoj, en kies kadro Jugoslavio povas gastigi tiel imponajn mondajn renkontiĝojn, kiuj havas larĝan internacian signifon, tiel laŭ la nombro de partoprenantoj, kiel laŭ sia krea, progresema kaj humanisma orientiĝo.”

“Esperanto ĉe ni povas konkeri ĉiam pli vastajn spacojn. Ĉe ni ekzistas rimarkinda interesiĝo pri la lernado de Esperanto. Por ilustration, mi mencias rezultojn de enketo farita en la Socialisma Respubliko Slovenio.” Sekvis manpleno da vere imponaj faktoj pri la populareco de la Movado por la Internacia Lingvo, kiuj rezultis el la enketo, pri kiu nia revuo jam raportis (novembro 1972, p.182) kaj al kiu ni revenos, eble jam en la sekvanta numero. La finaj alineoj de la parolado de s-ro Milatović tekstis jene:

“Esperanton kiel lingvon, feliĉe, ne alportas konkerantoj, koloniistoj, la fortaj kaj la potencaj, kiuj ankaŭ sur niaj areoj provadis forpuŝi la naciajn lingvojn. Esperanto estiĝis kaj evoluas el la bezono mem de la homoj kaj popoloj, kiuj parolas malsamajn lingvojn, interkompreniĝi kaj alproksimiĝi. Ĝuste en tiu libervoleco kuŝas ĝia plej profunda kultura, civiliza kaj humana misio. Esperanto ne povas kaj ne devas anstataŭi la naciajn lingvojn. Ĝi ne povas esti alternativo por la lingvoj de malgrandaj nacioj, kies emancipiĝo estas nedisigebla de la emancipiĝo de iliaj lingvoj, sed ĝi povas en la internacia kadro disvastigi la kulturojn de tiuj nacioj, kaj alproksimigi ilin al aliaj nacioj. Ĝi ankaŭ ne povas esti alternativo por la jam firmiĝintaj lingvoj, en kiuj kreiĝis kaj kreiĝas grandega kultura kaj scienca trezoro, sed ĝi povas limigi iliajn superregon kaj hegemonion. Esperanto estas la ponto inter la homoj kaj popoloj — la esprimo de iliaj bezono, volo kaj deziro. Ĝi devas evolui en vere demokrata maniero, ne per dekretoj de supre, kiel diris kamarado Tito, alparolante esperantistojn antaŭ dudek jaroj.

Oni devas, laŭ nia opinio, kredi, ke la ankoraŭ ĉiam dividita mondo, dividita antaŭ ĉio per ĉiam pli profunda ekonomia abismo inter la evoluintaj kaj ne-evoluintaj, per monopoloj kaj malegalrajteco, ekkonos la ĝustajn vojojn, kiuj kondukas al superrego de la diferencoj, al plifirmiĝo de la solidareco, kunlaboro, interkompreniĝo, al unu humaneco, sur kiu sola ĝi povas pluvivi. Kaj tiam, se Esperanto, kiel

ilo de internacia interkompreniĝo, kontribuos al tiu granda celo, ĝi pravigos siajn aspirojn esti la dua lingvo por ĉiu homo kaj nacio, kaj la klopodojn, kiujn vi ĉiuj faras tiucele.”

La parolado de s-ro Milatović (kiun kompetente interpretis s-ro Ivo Osibov) forte impresis la ĉeestantojn, kiuj plurfoje dum la parolado aplaŭde esprimis sian aprobon.

Ankaŭ la parolado de s-ro Živorad Kovačević, vicprezidanto de la Magistrato de Beograd, trovis aproban reeĥon inter la kongresanoj. Premataj per spaco-manko en ĉi tiu n-ro de la revuo, ni eble eĉ ne citus tiun paroladon, se ne estus aparte instige kaj kuraĝige aŭdi ankaŭ de homoj, kiuj tute ne apartenas al nia Movado, laŭdajn vortojn pri la laboro, kiun ni faras. S-ro Kovačević diris interalie:

“Via Kongreso ne estas nur renkontiĝo de adeptoj de nova internacia lingvo, sed ĝi havas pli larĝan socian kaj internacian signifon. Mi estas libera diri, ke tiu ĉi Kongreso prezentas tre signifan manifestacion de amikeco kaj kunlaboro — de tiuj nepraj faktoroj por la konservo de la paco en la mondo. Salutante la reprezentantojn de 40 naciaj esperantistaj organizaĵoj, ni samtempe direktas salutojn al la civitanoj de ĉiuj landoj kaj al la loĝantoj de ĉiuj urboj, el kiuj vi kolektiĝis ĉi tie.

La fakto, ke dum la Kongreso kaj en viaj reciprokaj kontaktoj vi interkompreniĝas sen interpretistoj — sufiĉe konvinke parolas pri la bezono kaj signifo de Esperanto. Klopodante forigi la lingvajn barojn, vi plenumas humanan kaj utilan mision kaj kontribuas al proksimiĝo kaj interligiĝo de la homoj dise tra la mondo. Samtempe, vi ne neas la bezonon lerni la naciajn lingvojn kaj ne senvalorigas la intereson de ĉiu homo ekkoni kulturon kaj tradicion de aliaj popoloj. La evoluo de la civilizo, progresigo de la komunikrimedoj, ekspansio de la internacia turismo kaj ĉiam pli oftaj kontaktoj de la homoj en la tuta mondo, prezentas objektivan antaŭkondiĉon, ke Esperanto fariĝu la lingvo de la estonteco. En tiuj noblaj klopodoj, vi havas subtenon de ĉiuj pacamaj kaj bonintencaj homoj de la mondo.”

Sur la podio dum la Solena Inaŭguro videblas (de dekstre): la unua premiito de la Oratora Konkurso, s-ro Stefan MacGill el Nov-Zelando, s-ro Ivo Osibov (interpretanto), kaj la salutantoj de la landaj Esperanto-organizaĵoj de Soveta Unio (prof. M. Isaev), Estona S.S.R., Meksiko kaj Kolombio.



Rekorda reprezentiĝo de ŝtatoj

La Solena Inaŭguro (daŭrigo)

La ĉeesto de diplomatoj en la Solena Inaŭguro de la 58-a UK superis ĉiujn ĝisnunajn rekordojn: reprezentiĝis 21 landoj kaj 2 internaciaj organizaĵoj. La Kongreson salutis reprezentantoj de: Aŭstralio (s-ro A. Vincent, konsilisto de la Ambasado), Aŭstrujo (s-ro R. Bogner, konsilisto de la Ambasado), Bulgarujo (s-ro Petkov, la Unua sekretario de la Ambasado), Ĉilio (s-ro A.M. Boric, ekonomia ataŝeo en la Ambasado), Danlando, Finnlando, Norvegujo kaj Svedujo (ĉiuj kvar skandinaviaj landoj salutis pere de s-ro Kärkkäinen, la Unua sekretario de la Finna Ambasado), Greklando (s-ro Drakoularakos, la Unua sekretario de la Ambasado), Japanujo (s-ro Hidekazu Macui, konsulo de la Ambasado), Hungarujo (s-ro J. Zegnál, afergvidanto de la Ambasado), Pollando (d-ro J. Sutor, konsilisto de la Ambasado), Urugvajo (s-ro Carlos A. Duarte, la ambasadoro), Usono (s-ro E. Bator, la unua sekretario kaj ŝargito pri kulturaj aferoj en la Ambasado, kiu parolis en Esperanto) kaj Vatikano (Patro Longoni). Ĉeestis, sed ne salutis, reprezentantoj de Germana Demokratia Respubliko (s-ro R. Kranhold, la dua sekretario de la Ambasado), Italujo (s-ro L. Marini, direktorino de la Itala Kultura Centro en Beograd), Nederlando (s-ro Kröner, kultura ataŝeo de la Ambasado), kaj Sovet-Unio (s-ro K. Beljajev, la dua sekretario de la Ambasado). Plue menciindas la ĉeesto de la dana ambasadoro en Beograd s-ro R. Wagner Hansen, kaj skriba mesaĝo, kiun al la Kongreso sendis la doĵeno de la beogradaj diplomatoj, la svisa ambasadoro, s-ro Kern. Krome, kiam venis la vico de la Landaj Asocioj por saluti la Kongreson, evidentiĝis, ke s-ro Stefan MacGill estis komisiita saluti la Kongreson en la nomo de la novzelanda Registaro kaj ĝiaj ĉefministro, edukministro, plus la ĉefo de la opozicio en la Parlamento. S-ro MacGill portis ankaŭ skriban mesaĝon de la novzelanda ĉefministro.

Oficiala saluto de UN-Centro

“Estas granda honoro por mi, kiel oficialulo de Unuiĝintaj Nacioj ĉi-tie en Jugoslavio, esprimi varmajn salutojn al la 58-a Universala Kongreso de Esperanto”. Tio ĉi estis la vortoj de s-ro Birger Hallden el la Informa Centro de UN por Jugoslavio kaj Albanujo en Beograd. En longeta parolado, kiu verŝajne estis la unua alparolo de niaj kongresoj fare de oficialulo de UN, s-ro Hallden, interalie, emfazis la gravecon de la neregistaraj organizaĵoj en la efektivigo de diversaj programoj de UN, esprimis ĝojon, ke en la ĉi-jara programo de ISU troviĝis pluraj temoj, “kiuj staras alte en la tagordo de UN”, kaj menciis sukcesan kunlaboron de la Informa Centro kun la Preparkomitato de la 29-a IJK, ĵus okazinta en Sarajevo. La Kongreson salutis ankaŭ d-ro Mane Budisavljević, en la nomo de Ruĝa Kruco. Tiam venis la vico konatiĝi kun brila beograda

pianisto Prof. Feodorović, kies muzikadon la kongresanoj ĝuos poste preskaŭ en ĉiu muzika programero de la Kongreso, kaj kiu ĉi tiun fojon intermezis per “La Revolucia Etudo” kaj “Nokturno” de Chopin. La prezidan martelon transprenis la nova vicprezidanto de UEA, prof. d-ro Boža Popović, kiu siavice transdonis la parolon al d-ro Sadler, direktoro de la CO de UEA kaj kutima ceremoniestro dum la lastatempaj UK-oj. Sekvis la salutoj de la Landaj Asocioj, unue de 26 aliĝintaj al UEA: Aŭstralio (prof. R.G. Robertson), Aŭstrujo (s-ro W. Mudrak), Belgujo (s-ro P. Peeraerts), Brazilo (s-ro F. de Souza Almada), Britujo (s-ro J. Brownlee), Bulgarujo (s-ro N. Aleksiev), Ĉeĥujo (s-ro D. Kočvara), Danlando (s-ro G. Kühlmann), Finnlando (s-ro H. Kesälä), Francujo (s-ro J.A. Rousseau), FR Germanujo (s-ro H. Schütt), Grekujo (s-ro G. Miggas), Hispanujo (s-ro J.M. Gonzalez Aboín), Hungarujo (d-ro J. Máteffy), Israelo (f-ino A. Zduńska), Italujo (d-ro G. Azzi), Japanujo (s-ro J. Isobe), Jugoslavio (s-ro J. Šaponjić), Kanado (f-ino L. Labelle), Nederlando (f-ino E. Otto), Norvegujo (prof. O. Reiersøl), Nov-Zelando (s-ro S. MacGill), Pollando (s-ro S. Świstak), Svedujo (s-ro N. Johansson), Svislando (s-ro K. Greutert), Usono (f-ino V. Bartmess). Kiam venis la vico de la Landaj Asocioj, ankoraŭ nealiĝintaj al UEA, surprizo estis tri salutantoj el Sovet-Unio: prof. M. Isaev salutis nome de la sovetaj esperantistoj, sed ankaŭ s-ro J. Ojalo en la nomo de la Estona SSR, kaj prof. G. Sevak en la nomo de la Armena kaj najbaraj sovetaj respublikoj. Krome, salutis ankaŭ la reprezentantoj de la Landaj Asocioj en Germana Demokratia Respubliko (s-ro R. Graetz), Kolombio (inĝ. L. H. Ortigón), Meksiko (f-ino Zepeda) kaj Slovakujo (d-ro M. Šaturová). Fine venis ankaŭ salutoj el tri landoj sen organizita Esperanto-movado: Egiptujo (d-ro N. Isaac), Maroko (s-ro K. Mahjoub) kaj Singapuro (f-ino K. Cheng).

Impona revuo de 36 landoj

Tiu ĉi impona revuo de la reprezentantoj de la esperantistaro de 36 landoj efektive daŭris iom tro longe, sed ĝi definitive ne estas io, kion oni forlasu el la programoj de la estontaj kongresoj. Ĝi restas impona pruvo pri la universaleco de UEA, kaj ni ne aŭdacu kredi, ke ĝi esence ne pli gravas, eble ĝuste pro sia amaseco, ol la nin flatanta svarmo da diplomatoj en la inaŭguraj solenaĵoj de la kongresoj. Tamen, refoje necesus diri, ke la Landaj Asocioj devus pli zorge elekti siajn salutantojn, kiel ekz. ĉi-foje faris Belgujo, Nov-Zelando kaj Usono, deleginte por tiu tasko junajn kaj elokventajn reprezentantojn, aŭ Pollando kaj FR Germanujo, kies salutintoj sciis eluzi sian “minuton” en la Inaŭguro por informi la kongresanojn pri la realigo de kolora televida filmo pri Zamenhof (la unua), kaj jam en la Inaŭguro reklami la venontjaran Kongreson (la dua). Post “Preludo” de Raĥmaninov, festparolis la estraro de UEA pri kongresoj kaj konferencoj, d-ro J.C. Wells, kies freŝtonan paroladon ni aperigas en ĉi tiu n-ro de la revuo. La Inaŭguro, kompreneble, finiĝis per la komuna kantado de “La Espero”, kiu, gvidata de la ĉeĥa kantisto Smyčka, sonis tute solene kaj tiel kronis la vere imponan Inaŭguron de la 58-a UK en Beograd.

Por amikeco – kies antaŭkondiĉo estas komuna lingvo...



Sinjoro Prezidanto,
Ekscelencaj moŝtoj, sinjorinoj kaj sinjoroj,
Ni kunvenis hodiaŭ en Beograd, en la ĉefurbo de la Socialisma Federacia Respubliko Jugoslavio. Mi salutas la urbon Beograd, kaj mi salutas la landon, kies ĉefurbo ĝi estas. Mi salutas Jugoslavion kiel landon de granda diverseco kaj de frapaj kontrastoj. Tiun diversecon ni ĉiuj jam povis vidi en la bunta pejzaĝo, kiun ni trapasis survoje al la Kongreso. Ni vidis la krutajn montojn formantajn la spinon de la lando; ni vidis la belan marbordon kun sablaj plaĝoj kaj krutaj klifoj ĉe Adriatiko; ni vidis la fekundan ebenaĵon en la mezo de la lando. Mi salutas la landon Jugoslavio ankaŭ pro ĝia tradicio de rezisto. Ĝiaj nacioj, ĝiaj lingvoj kaj ĝiaj tradicioj formiĝis en la lukto kontraŭ subpremantoj. Kaj hodiaŭ ĝi estas konata pro sia rolo kiel eksterbloka ŝtato en la internaciaj aferoj, kiu rezistas al la trudoj de la grandaj potencoj en la mondo; konata ankaŭ pro sia influo ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj pro sia apogado de tiu organizaĵo.

Lando de diverseco —
pro diverseco de la kulturaj influoj, kiuj muldis ĝin. Sur la sudslava fundamento de la popolo venis kulturaj influoj de tri ĉefaj direktoj. Estis la romia influo de la okcidento, kun la latina lingvo, kaj poste ankaŭ la venecia imperio. Estis la germanlingva influo el la nordo, kun la aŭstria imperio kaj la Habsburgoj. Kaj estis la turka influo el la sudo, kun muzulmana civilizo. Kun tiuj kulturaj influoj estis ligita ankaŭ la diverseco de religioj: ĉar en tiu ĉi lando troviĝas tri grandaj religiaj tradicioj — katolika, ortodoksa kaj islama — kiuj eĉ relative pace kunezistis kaj reciproke toleris sin. La slava popolo, kiu tiel venis sub tiom da diversaj eksteraj influoj, estis ofte viktimo de ekstera agreso. Multaj devis pasigi kvar jarcentojn aŭ eĉ pli sub fremda jugo. Ili estis venkitaj, sed neniam detruitaj; ili estis subpremataj, sed neniam elradikitaj. Ĉiam ili luktis por sia libero kaj por la egalrajteco de ĉiuj popoloj.

Lando de diverseco —
pro la konsisto de la popoloj, kiuj loĝas en ĝi. Ili nombras inter si ses naciojn — slovena, kroata, serba, montenegra, makedona, kaj nun ankaŭ muzulmana. Troviĝas ankaŭ du grandaj naciecoj minoritataj — albana kaj hungara — kaj krome multaj aliaj naciaj

minoritatoj. Jugoslavio havas kvar oficialajn lingvojn: ĉiuj kvar, la slovena, la makedona, la serba kaj la kroata, estas egalaj kaj egale oficialaj. Ĉiuj kvar estas uzataj en la lernejoj, ĉiuj havas egalrajtecon en la kortumoj kaj ĉe ĉiuj ŝtataj instancoj. Ĉiuj estas uzataj por la radio kaj televido. Ankaŭ la lingvoj de la minoritatoj ĝuas konsiderindajn rajtojn, ne malplej grave ĉe la amaskomunikiloj. Tio klarigas, kial Jugoslavio estas ofte citata kiel ekzemplo de lando, kiu modele solvis sian internan lingvo-problemon. Tiu bona kaj justa solvo kostas monon, same kiel ĉiu vera egaleco kaj justeco kostas monon. Sed ekzistas finfine aliaj landoj, eble pli riĉaj, kiuj ne volas elspezi monon por atingi tian egalecon kaj justecon.

Ideala loko por tia temo

Pro tiuj konsideroj Jugoslavio estas ankaŭ ideala loko por okupiĝi pri nia kongresa temo, kiu estas *Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko*. Multspecaj estas la lingvoproblemoj de la mondo. La problemon pri lingvo de internaciaj rilatoj ni bone konas; ofte ni diskutis ĝin, daŭre ni okupiĝas pri ĝi, kaj ĉiam ni insiste pledos por la solvo de tiu problemo per la alprenado de la Internacia Lingvo Esperanto. Sed ekzistas ankaŭ enlandaj lingvoproblemoj rilatantaj al la uzo de tiu aŭ alia lingvo interne de iu ŝtato. La Duan Ĝeneralan Kunvenon de UEA ni dediĉos al diskutado de tiuj problemoj. Ni volas kompari la situacion en diversaj ŝtatoj, en plurlingvaj ŝtatoj de diversaj tipoj. Plej evidenta problemo ekzistas en landoj, en kiuj estas tri ĉefaj lingvoj, kvar ĉefaj lingvoj, aŭ eĉ pli. En iuj tiaj ŝtatoj la lingvoj povas bone kaj pace kunezisti, kiel en Jugoslavio, tiel ke ĉiuj ĝuas rajton kaj respekton. Sed en aliaj kreiĝas akraj problemoj, kun konfliktoj kaj streĉitecoj inter la diversaj lingvoj. Precipe akra estas la situacio en pluraj ekskoloniaj teritorioj de Afriko kaj Azio, landoj ankoraŭ kroĉitaj al la lingvo de la antaŭa kolonia mastro. En tiaj landoj povas okazi, ke la edukado okazas plejparte aŭ eĉ tute per la angla lingvo, aŭ la franca, aŭ la portugala, tiel ke la intelektularo estas lingve dividita for de la cetera socio kaj fremdigita kontraŭ la lingvoj kaj kulturoj de la indiĝenaj tradicioj.

Ekzistas pluraj ŝtatoj kun du ĉefaj lingvoj. En iuj kazoj la du lingvoj estas egalrajtaj en la teorio — laŭ la konstitucio, aŭ el jura vidpunkto — sed en aliaj

Festparolado

(daŭrigo)

kazoj tiu teoria egalrajteco ne ekzistas. Sed ĉu ĝi ekzistas aŭ ne, certe ĝi ofte mankas en la praktiko. Povas esti, ke unu el la du havas pli altan nombron da parolantoj. Aŭ povas esti, ke ludas rolon faktoroj de prestiĝo kaj socia klaso, ĉar la du lingvoj ne apartenas al la samaj sociaj tavoloj. Aŭ povas esti ke el historia vidpunkto unu estis la lingvo de la venkanto, la alia estis la lingvo de la venkito. La sekvo estas, bedaŭrinde ofte, ke unu lingvo havas superan pozicion, dum la alia suferas malrespekton kaj diskriminacion.

Kaj ekzistas ŝtatoj kun nur unu ĉefa lingvo. Oni povus supozi, ke tie ne ekzistas problemoj. Sed plurkaze malantaŭ la fasado de homogeneco kaŝiĝas granda maltolero. Tre ofte en tiaj landoj la ŝtato, aŭ la popolo kiu konsistigas la plimulton, decidis krude subpremi la lingvon kaj la kulturon de minoritataj grupoj. Tiun sintenon oni pravigas — povas esti — per la ideo, ke ĝi estas en la interesoj de la unueco de la ŝtato. Sed kvankam povas ekzisti sincera deziro "asimili" minoritatajn grupojn, aŭ enmigrintojn, aŭ gastlaboristojn, kaj pro tio oni edukas iliajn infanojn sole per la lingvo de la ŝtato, tio bedaŭrinde tro ofte rezultigas, ke post la eduko la homo trovas sin analfabeta en sia propra gepatra kaj hejma lingvo, fremda kaj malrespekta al ĝiaj kulturaj valoroj. Siavice la unulingva plimulto povas havi malŝatan rigardon al aliaj lingvoj. Tio estas la tiraneco de la plimulto, kaj tion ni kontraŭas.

Ni, la Esperanto-Movado, staras por tolero. Ni volas vidi laŭeble toleran solvon ankaŭ de internaj lingvo-problemoj. Ni respektas la fakton, ke ankaŭ por la parolanto de minoritata lingvo lia lingvo estas iasence parto de lia personeco, kaj ke ĝi meritas respekton. Nur per tiu respekto ni povas konservi la homan dignon. Ni ne volas subpremi la lingvojn de minoritatoj. Ni ŝatas la riĉan mozaikon, kiun ili prezentas. Ni ne volas krude trudi la lingvon de la plimulto, nek altrudi la lingvon de ekstera potenco.



Kaj nun al aktuala demando. Kelkaj salutantoj jam tuŝis la temon de la perspektivoj, kiujn prezentas nun la Konferenco de Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. En la fino de junio renkontiĝis en Helsinko tridek kvin eŭropaj ministroj de eksterlandaj aferoj. Fine de aŭgusto komenciĝos en Ĝenevo la formalaj preparlaboroj por daŭrigi tiun konferencon, kaj la ministroj mem rekomencos siajn diskutojn en la mezo de septembro. Ili traktas tri ĉefajn problemojn. Du estas la sekureco — por krei agordon de konfido en Eŭropo — kaj la ekonomio. Pri ili mi diras nenion. Sed la tria estas la kulturaj demandoj. La ŝtatoj deklaras, ke ili firme deziras plivastigi interhomajn kontaktojn, krei pli liberan reciprokan informadon kaj informiĝon, kaj akceli la kulturajn interŝanĝojn. Tio implicas interŝanĝadon ne nur de ideoj kaj eldonaĵoj, sed ankaŭ de personoj; ne nur la transdonon de radio- kaj televid-programoj, sed ankaŭ la faciligon de amasa kultura turismo inter la diversaj landoj. Sed, ni demandas, kion oni faros pri la problemo de lingva komunikado? Kiel povas sukcesi tiuj belaj intencoj, se ĉie katenas nin la lingvaj baroj?

Ebligi dialogon

Ni, Universala Esperanto-Asocio, estas neŭtralaj en la politiko. Sed ni deziras faciligi la lingvajn rilatojn en ĉiuj internaciaj organizaĵoj kaj por ĉiuj individuoj, kiuj havas internaciajn rilatojn. Ni volas ebligi dialogon ne nur inter blokoj kaj ŝtatgrupoj, ne nur inter ŝtatoj kaj nacioj, sed ankaŭ, kaj plej grave, inter personoj. Ni volas agi por solvi la problemon ankaŭ sur persona kaj homa nivelo, por ebligi rektajn kontaktojn kaj individuan interkonatiĝon. Ni volas, ke estu kreita kaj flegata inter la popoloj amikeco ne abstrakta, limigita al imponaj frazoj kaj belaj rezolucioj, sed konkreta, kio signifas, ke devas esti stariĝitaj kaj vivtenataj individuaj personaj interrilatoj. Kaj antaŭkondiĉo por tia evoluo de la internaciaj kontaktoj estas komuna lingvo.

En Ĝenevo baldaŭ la tridek kvin ministroj devos interkonsenti praktikajn rimedojn por larĝigi ekonomiajn kaj sciencajn interŝanĝojn kaj por igi pli libera la fluon de homoj kaj de ideoj. Por tio oni bezonas komunan lingvon. En la kosmo baldaŭ ekorbitos satelitoj kapablaj dissendi televidajn programojn samtempe al la tuta homaro aŭ al gravaj partoj de ĝi. Por tio, se ni volas eviti novan tiranecon de la plimulto, oni bezonas komunan lingvon. Ni proklamas, ke la solan racian solvon de la problemo prezentas la alprenado de la Internacia Lingvo Esperanto.

Ĝi estas neŭtrala. Ĝi ne trudas la lingvon de forta ŝtatpotenco, ĝi ne sekvigas la kreon de lingvaj kolonioj (kiaj bedaŭrinde jam ekzistas ankaŭ en Eŭropo), ĝia sorto ne estas ligita, kiel la sorto de tiu aŭ alia nacia lingvo, al la leviĝo kaj posta neevitebla falo de tiu aŭ alia potenca ŝtato.

Ĝi estas facila. Ĝi signifas, ke oni povus levi for la pezan ŝarĝon de lingvolernado. Tiuj, kiuj havas talenton por lingvoj, studu ilin. Sed per Esperanto ankaŭ tiu, kiu ne havas tian specialan talenton, povas konatiĝi kun la homoj kaj la kulturoj de aliaj landoj. Ni pledas do por la ĝenerala adopto de la Internacia Lingvo, por ke ni tiel per unu komuna lingvo, neŭtrala kaj facila, konkrete kontribuu al la proksimigo de la popoloj de la mondo.

Organiza diskuto: la laborkunsidoj

La kunsidoj de la Komitato kaj Estraro de UEA en Beograd okazis sub prezido de la nova vicprezidanto prof. Boža Popović. La prezidanto de UEA, prof. Lapenna, bedaŭrinde ne povis ĉeesti la Kongreson pro kaŭzoj ekster lia kontrolo. Li tamen ĝis la lasta momento okupiĝis pri la kongrespreparoj kaj faris ĉion necesan por ke la aranĝoj glate disvolviĝu sen lia gvido: ellaboro de la tagordoj, prizorgo de la necesaj anstataŭadoj, sugestoj por la kongresa rezolucio ktp. Kiel kutime, la laboraj aranĝoj grupiĝis sub tri ĉefaj rubrikoj: la Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA, la kunsidoj de la Komitato kaj la kunsidoj de la Estraro.

La Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA

Pri la Dua Ĝenerala Kunveno, dediĉita al la problemoj de lingva egalrajteco, ni amplekse raportas sur la paĝo 148. La programo de la Unua Ĝenerala Kunveno estis la tradicia: salutoj de fakaj organizaĵoj kaj ĝenerala diskuto pri la Estrara Raporto por la pasinta laborjaro. Leviĝis pluraj demandoj kaj informpetoj el la membraro: interalie pri la kunlaborantaj fakaj asocioj, pri la eldona agado de UEA, pri la plej bona metodo statistiki librovendojn, pri la internacia kunordigo de la landaj informaj fakoj ktp. Tamen la fakto, ke la broŝuro kun la Estrara Raporto kaj la Raporto de CED ne povis esti frue dissendita al la kongresanoj, bedaŭrinde malhelpis profundan kaj fruktodonan diskuton.

La Komitato kaj la kotizoj

La plej longajn kaj eĉ dolorajn diskutojn en la Komitato elvokis la buĝetpropono por 1974. Spite al novaj gravaj ŝparoj, precipe ĉe la sendokostoj de la revuo kaj jarlibro, la Estraro estis devigita — fronte al ĉiam pli altaj kostoj pro la senhalta inflacio en Nederlando kaj aliaj landoj — proponi altigon de la individuaj membrokotizoj je unu triono. Konsiderante, ke jam 4 jarojn la kotizoj restis senŝanĝaj, la Komitato fine akceptis la proponon. Ĝi tamen samtempe konstatis, ke la nuntempa malstabila stato de la internaciaj financaj rilatoj jam kaŭzis sufiĉe gravan altiĝon de la kotizoj en landoj, kies valuto malplivaloriĝis kontraŭ la guldeno. Sekve ĝi decidis — por la unua fojo — enkonduki sistemon de neegalaj kotizoj por la diversaj landoj. Tio signifas, ke la membroj en iuj landoj pagos estonte eĉ pli ol la egalvaloro de la kotizo en guldenoj, dum en aliaj ili ĝuos pli favoran tarifen. (Vidu la detalan kotizotabelon sur la paĝo 159.) La Komitato fidis, ke tiu laŭlanda ĝustigo de la tarifo helpas eviti ian signifan falon de la membronombro.

Krom pri financo kaj administrado, laboris dumkongresaj komisionoj de la Komitato pri: TEJO kaj la junularo; Regiona agado, precipe en Eŭropo; kaj Laborplano kaj Estrara Raporto.

Ekde januaro 1974 okazos plua integriĝo de TEJO, la junulara sekcio de UEA, kun la Asocio. TEJO, jam tute sendependa organizaĵo, fariĝis de jaro al jaro pli firme ligita kun la organizo de UEA mem. La nova

interkonsento, origine aprobita en Londono kaj Edinburgo en 1971, celas kompletan integriĝon de la financoj kaj administrado kaj pli proksiman kunagadon per eniro de TEJO-aktivuloj en la gvidajn organojn de UEA kaj, aliflanke, reprezentiĝo de la Centra Oficejo en la kongresoj kaj kunsidoj de TEJO. La komisiono pri regiona agado rekomendis, interalie, starigi du kunordigajn centrojn por la agado en Eŭropo, respektive por la okcidenteŭropaj kaj orienteŭropaj landoj. La Komitato tamen malakceptis tiun rekomendon, argumentante pri ĝenerala tendenco al tuteŭropa kunlaboro kaj integriĝo, kies lasta ekzemplo estas la Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro okazinta en Helsinko.

Laŭ rekomendo de la kompetenta komisiono, la Komitato fine akceptis novan Laborplanon, bazitan sur la Dua Baza Laborplano (1962). Ĉar ĝiaj ĉefaj amendoj al la antaŭa plano jam estis elstarigitaj en la revuo *Esperanto* (majo 1973, p. 81) kaj ĉar la kompleta teksto akceptita en Beograd aperos en unuaj el la venontaj numeroj de la revuo, ni ĉi tie ne eniros la detalojn.

Inter la ceteraj decidoj de la Komitato en Beograd estas aparte menciindaj la akcepto de plia aliĝinta landa asocio en Brazilo — Kultura Kooperativo de Esperantistoj — kaj la aprobo de kontrakto pri kunlaboro kun plia faka organizaĵo, la asocio "Monda Turismo", kiu espereble sukcesos unuecigi kaj kunordigi la ĝis nun iom disajn agadojn sur tiu kampo.

Kunsidoj de la Estraro

La Estraro de UEA kunsidis trifoje, antaŭ, dum kaj post la Kongreso. Ĝiaj laboroj koncernis plejparte la tagordon kaj decidojn de la Komitato, krom diversaj internaj demandoj. Tamen jam publikigeblaj estas la decidoj subvencii du novajn lernolibrojn por landoj kun malforta movado: korean kaj bengalan, kies manuskriptoj estas jam prespretaj. La saman emfazon al la agado en la "Tria Mondo" spegulas ankaŭ la decido adresi al la Konferenco de Eksterblokaj Landoj (en septembro 1973, en Alĝerio) proponon pri starigo de nova internacia universitato por la evolulandoj, kiu utiligus Esperanton kiel instrulingvon.

Eŭropa rezolucio

Aliloke en ĉi tiu numero aperas la teksto de la Kongresa Rezolucio, proponita de la Estraro, aprobita de la Komitato kaj fine akceptita unuanime de la plena Kongreso en la Solena Fermo. Escepte, ĝi ĉijare direktiĝas speciale al la registaroj kaj instancoj eŭropaj. Se la belaj vortoj de la ministroj — pri interproksimigo de la ordinaj civitanoj de la eŭropaj landoj kaj intensigo de kulturaj interŝanĝoj internaciaj — ne restu nur sintrompaj revoj, tiam necesos, ke la plej altaj reprezentantoj de la eŭropaj popoloj fine ekatentu tiun por ili ĉiam pli aktualan alvokon: akcepti la Internacian Lingvon kiel neŭtralan instrumenton de komunikado.

V.S.

LINGVA EGALRAJTECO EN TE

DUA ĜENERALA KUNVENO DE U.E.A.

Prezentante la temon de la diskutoj, d-ro Wells atentigis al la enkondukaj notoj, kiujn li verkis por la Kongresa Libro. Kiel dirite en tiuj notoj, al la lingva problemo en internaciaj rilatoj la Internacia Lingvo prezentas idealan solvon. Sed ekzistas ankaŭ lokaj lingvaj problemoj, precipe ŝtataj kaj naciaj. Kiaj estas tiuj problemoj? Ĉu eblas ilin solvi laŭ maniero, kiu estas samtempe justa kaj praktika? Ĉu lingvaj minoritatoj necese devas suferi diskriminacion? Ĉu la principo de lingva egalrajteco, kiu estas proklamita multloke en la teorio, estas atingebla en la praktiko?

D-ro Wells atentigis al la malfacila demando difini, kio estas lingvo. Kiel distingi inter "dialekto" kaj "lingvo"? Ĉu la usona estas dialekto de la angla normlingvo? Se jes, ĉu ankaŭ la brita versio estas dialekto? Aŭ ĉu ili estas du lingvoj? Li montris, ke la termino "dialekto" venas el la antikva greka, por kiu klasike ne ekzistis unu komuna normo, sed grupo da parencaj normoj (ekzemple historion oni kutime verkis en la jonia skribvario, ĥoran lirikon en la doria, tragedion en la atika). Poste, kiam okazis politika unuecigo de antikva Greklando, evoluis ankaŭ komuna normlingvo, la *kojne*, bazita sur la dialekto de Ateno. Simile en Francujo la ekapero de normigita tutnacia lingvo, kiu prenis la lokon de la plene literaturaj dialektoj antaŭe florintaj, okazis paralele kun la evoluo de centrigita franca ŝtato. La formiĝo de la itala ŝtato signis mortan baton por la piemonta lingvo (aŭ dialekto).

Kun presado, industriigo, popola edukiĝado, la moderna nacio-ŝtato en hodiaŭa formo aperis, kaj kun ĝi la koncepto de nacia (ŝtata) lingvo. Lojaleco al la nacio aŭ ŝtato implicas lojalecon al ĝia nacia aŭ ŝtata lingvo. Tiel en pluraj landoj ekestis la konfliktoj, kiuj ekzistas ankoraŭ hodiaŭ. Apartaj problemoj estis en landoj, kiuj havis aŭ plurajn evoluintajn lingvojn (ekz. Belgujo) aŭ neniun (ekz. pluraj afrikaj ŝtatoj). En ĉi-lastaj estis/as la ebleco aŭ apliki la lingvon de la edukita elito, kiel la anglan aŭ la francan en Afriko, kaj la latinan iam en Hungarujo, aŭ evoluigi popolidiomon en nacian lingvon, kiel la finnan en Finnlando, kaj la novhebrea en Israelo.

Raporton pri Jugoslavio prezentis d-ro Peter Zlatnar. El proksimume 20 milionoj da loĝantoj, li diris, iom pli ol 15 milionoj apartenas al la serbokroata lingva teritorio. Ekzistas ankaŭ 1,6 milionoj da slovenoj, 1,2 milionoj da makedonoj, 1,3 milionoj da albanoj, 0,47 milionoj da hungaroj, 0,18 milionoj da turkoj, kaj aliaj malpli grandaj minoritatoj slovaka, cigana, bulgara, rumana, germana kaj itala. Ankaŭ diversaj aliaj naciecaj grupoj estas dissemataj tra la lando. Jugoslavio konsistas el ses etne rondigitaj, administre memstaraj respublikoj: Serbio, Kroatio, Slovenio, Makedonio, Montenegro kaj Bosnio-Hercegovino. En la kadro de Serbio estas ankaŭ aŭtonomaj regionoj Vojvodino (granda hungara minoritato) kaj Kosovo (granda albana minoritato).

En Jugoslavio oni konscias, ke la komuneco de jugos-

laviaj popoloj kaj naciecoj povas ekzisti nur se ĉiuj sentas sin liberaj kaj egalrajtaj. Kiel jam aludite de d-ro Wells, Jugoslavio eĉ modele ordigis sin en tiu rilato. La proponita projekto por la nova Konstitucio diras (par. 223), ke la popoloj kaj naciecoj estas egalrajtaj, kaj (par. 224) same iliaj lingvoj kaj ties ortografioj. Do unueca ŝtata lingvo ne ekzistas; la diversaj naciaj lingvoj estas egalrajtaj en oficiala kaj neoficiala uzo; en la Federacia Parlamento ĉiu rajtas paroli en sia nacia lingvo kaj tio devas esti tradukata; en respublikaj parlamentoj la reprezentantoj de minoritatoj devas paroli en sia lingvo kaj tio devas esti tradukata; en la aŭtonomaj regionoj estas oficialaj la serba kaj minoritataj lingvoj; kaj en komunumoj estas uzataj ĉiuj lingvoj parolataj en la komunumo.

Do ĉiu lingvo ĝuas bonajn rajtojn sur sia propra teritorio. En oficialaj kontaktoj inter malsamlingvanoj deviga tradukado estas aplikata. Sed en senpera persona interkomunikado en entreprenoj k.s. objekte la serbokroata superregas. Tial larĝaj tavoloj de la alilingvaj popoloj, ekz-e la slovena, sentas sin socie endanĝerigitaj. Tio provokas tension, kiu povas erupcii en ŝovinisman konflikton. Ĝuste pro tio la lingva uzado elstaras kiel grava socipolitika faktoro.

D-ro Zlatnar daŭrigis per priskribo de la enketo, kiun faris la slovenaj esperantistoj en ĉiuj komunumoj en Slovenio. Ĝi montris, ke ekzistas treege larĝa aprobo por la enketita programo favora al Esperanto (100% el komunumestroj, 83% el lernejoj, 92% el elementaj lernejoj, 82% el junularaj organizaĵoj, k.c.). Sekve Slovenia Esperanto-Ligo kaj Amikoj de Esperanto en Slovenio sendis Deklaracion adresitan al la publiko, al la nacia parlamento, al politikaj forumoj kaj al ŝtat-administraj organoj kaj lernejoj. Tiu Deklaracio finiĝas per la proponoj (1) ke ĉiu principe rezignu uzi propran nacian lingvon en rilatoj kun aliaj popoloj, kaj (2) ke la Internacia Lingvo Esperanto fariĝu la dua lingvo por ĉiu, kiel komuna lingvo por internacia uzo kaj esprimo de aparteno al pli larĝa homa komuneco. Ĝi estas ja samgrade fremda kaj samgrade propra al ĉiu.

Post tio sekvis raporto pri Svislando, verkita de Tzaut Olivier kaj laŭtleĝita de s-ino Yvonne Cotton. Li raportis, ke Svislando havas kvar naciajn lingvojn por ĉ. 6 milionoj da loĝantoj: la germana (65% el la loĝantoj), franca (18%), itala (12%) kaj romanĉa (1%); aliajn lingvojn parolas 4%. Proporcie la germana kaj franca perdis lokon en la lastaj jaroj profite al la itala kaj jugoslaviaj lingvoj (pro enmigrado de laboristoj parolantaj tiujn lingvojn). Severan lingvan problemon nun prezentas la fremda loĝantaro (nun jam 16%). La lingvo de la franca parto estas tiu de Parizo, sed en la germana parto oni uzas diversajn malsamajn dialektojn. Ĉe la radiostacioj, la ĝeneralajn informojn oni donas en la germana normlingvo, sed la komentojn en dialekto. La normlingvo estas uzata por la instruado.

ORIO KAJ PRAKTIKO

Iuj kantonoj estas komplete germanlingvaj (ekz-e Zuriko), aliaj komplete franclingvaj (ekz-e Neuchâtel); sed en aliaj la lingva limo trairas la kantonon (Bern, Fribourg, Valais), aŭ eĉ dividas urbon (Bienne).

Oni nun intensigas la instruadon de la germana (por franclingvanoj) kaj de la franca (por germanlingvanoj). La itallingvanoj lernas ambaŭ! Sed ekzistas malfacilaĵo trovi instruistojn, kiuj kontentige regas la duan lingvon. Se estas lando, kie Esperanto povus vere prezentiĝi kiel la sola solvo (finas Tzaut Olivier), tio estas ja Svislando. Sed por atingi tiun celon ĉio estas ankoraŭ farota.

Post tio **d-ro Wells** diskutas la demandojn pri specoj kaj tipoj de lingvoj en iu ŝtato. Li mencias precipe la proponon de la usona lingvisto **Ferguson** rekonu tri specojn: ĉefa lingvo (angle: major language), malĉefa lingvo (minor language) kaj specialstatusa lingvo (language of special status).

Ĉefa lingvo estas tiu, kiu en iu ŝtato estas

- (a) parolata ĝepatre de 25% aŭ pli el la loĝantaro, aŭ de unu miliono aŭ pli da loĝantoj (Ekzemplo: la Kveĉva en Bolivio, parolata de unu triono de la loĝantaro, sed ne oficiala.)

kaj/aŭ (b) oficiala (Ekzemplo: la irlanda en Irlando, kiun denaske parolas nur 1 ĝis 3%.)

kaj/aŭ (c) uzata en la edukado de 50% aŭ pli el lernantoj en duagrada lernejo (Ekzemplo: la angla en Etiopio, kie la amhara estas tamen la oficiala lingvo.)

Malĉefa lingvo estas tiu, kiu en iu ŝtato estas

- (a) parolata de 5% ĝis 25% el la loĝantaro, aŭ de pli ol 100 000 loĝantoj (Ekzemploj: la vaska en Hispanujo, la frisa en Nederlando, la kimra en Britujo.)

kaj/aŭ (b) uzata kiel instrulingvo ne nur en la plej unuaj klasoj (Ekzemplo: la dagbana en Ganao.)

Specialstatusa lingvo estas tiu, kiu en iu ŝtato estas

- (a) vaste uzata por religiaj celoj (Ekzemplo: la palia en Srilanko (eks-Cejlono).)
- aŭ (b) vaste uzata por literaturaj celoj (Ekzemplo: klasika ĉina en Tajvano/Formozo.)
- aŭ (c) vaste instruata en duagrada lernejo (Ekzemploj: la franca en Hispanujo, la angla en skandinaviaj landoj.)
- aŭ (ĉ) multe uzata kiel enlanda interlingvo (Ekzemplo: la piĝinangla en Liberio.)
- aŭ (d) "ĉefa" lingvo por unu aĝogrupa (Ekzemplo: la japana en Tajvano/Formozo por edukitoj aĝaj 45-65 jarojn.)

Inter la diversaj tipoj de lingvoj Ferguson metas jenajn:

1. Popolidiomo (angle: vernacular) — nenormigita denaska idiomo de iu parolkomunumo.
2. Normlingvo (standard) — normigita popolidiomo.

3. Klasika lingvo — normlingvo, kiu ne plu estas denaska.

4. Piĝina lingvo — hibrida lingvo, ne denaske parolata.

5. Kreola lingvo — piĝino, kiu fariĝis denaska lingvo en iu parolkomunumo.

Inter la diversaj funkcioj de lingvoj li rekonas jenajn: grupa (de iu difinita grupo en la nacio), oficiala (por celoj registaraj, edukaj, armeaj ktp.), interna-interlingva, eduka, religia, internacia-interlingva, lernejestudata.

Post tio sekvis raporto de s-ro **Guy Matte** pri Kanado. Unue li koncize aludas al la lingvoj de indiĝenaj indianoj (kvarono de miliono) kaj de eskimoj (kelkaj miloj). Iliaj lingvoj ne havas leĝajn rajtojn, sed estas instruataj en tribaj lernejoj. Sed la ĉefa demando estas tiu de franckanadanoj—preskaŭ 6 000 000 da loĝantoj.

Dum du jarcentoj la franckanadanoj estis plimulto. Tiun pozicion ili perdis pro la enmigrado de lojalistoj (usonanoj fidelaj al la brita reĝo) kaj aliaj (el Eŭropo). Nun la franclingva grupo estas minoritato, kun 1/3 el la loĝantaro, lastatempe eĉ nur 1/4. La malkresko nun timigis la franckanadanojn, kaj kreiĝis nova movado por la apartigo de Kebekio.

La franca lingvo havas protektatajn lingvajn rajtojn nur en unu provinco, Kebekio, kvankam troviĝas grandaj franclingvaj grupoj en aliaj provincoj. En la 1960-aj jaroj estis decidite, ke la franca kaj angla lingvoj estu egalaj ĉie, kie la Federacia Registaro havas potencon; ankaŭ la provincoj Ontario kaj Nov-Brunsviko faris saman decidon. En la praktiko, tamen tiu kiu parolas nur la francan apenaŭ povas trovi laboron; aliflanke la Federacia Registaro preferas tiun, kiu parolas ambaŭ lingvojn (el kiu aro 90% estas de franckanada deveno). Tio tiel timigis la anglingvanojn, ke la registara partio, favora al dulingvismo, ricevis fortan baton en la elektoj.

Do franckanadano, kiu ne scias la anglan, fariĝas duaklasa civitano. En Kebekio plimulto de 5 el 6 estas franclingvaj; sed eĉ tie enmigrintoj eroziadas ilian teritorion. Kaj la batalon inter 6 milionoj da francaj kaj 14 milionoj da anglaj kanadanoj oni devas vidi en perspektivo de la 200 milionoj da angle-parolantoj en Usono kaj Kanado kune.

Poste raporton pri Belgujo donas s-ro **Paul Peeraerts**. Oficiale Belgujo konsistas el 4 lingvaj regionoj: nederlandlingva (60% el la loĝantoj), franclingva (30%), dulingva, t.e. nederlanda-franca (10%, la ĉefurbo Bruselo), kaj germanlingva (malpli ol 1%). Tiu ĉi situacio estas la rezulto de longa historio kaj de multaj sociaj, kulturaj, kaj religiaj faktoroj. Praktike tamen ekzistas multaj problemoj, precipe en la ĉiutaga vivo. Multaj en oficiala servo kaj en la privata vivo rifuzas paroli duan lingvon kaj tiel malfaciligas kaj malagrabiligas la kontaktojn inter la loĝantoj de Belgujo.

Lingva egalrajteco

(daŭrigo)

Post 10-minuta paŭzo, la kunveno daŭrigis siajn diskutojn per raporto de d-ro Wells pri la minoritata lingvo kimra en Britujo. De la jaro 1536, kiam Kimrujo estis aneksita de Anglujo, la kimra lingvo estas oficiale diskriminaciata kaj la angla trudata. Tio fariĝis aparte akuta en la fino de la pasinta jarcento kaj kondukis al la hodiaŭa situacio, ke nur ĉ. 20 procentoj el kimroj ankoraŭ parolas la lingvon. Ĝin iom mildigis, tamen, la akcepto antaŭ ses jaroj de leĝo (Welsh Language Act), kiu la unuan fojon donas certajn rajtojn, tamen nedevigajn, al la kimra lingvo por oficiala uzo. Antaŭ dek jaroj estis fondita la Societo por la Kimra Lingvo (Cymdeithas yr Iaith Gymraeg), kiu dum la jardeko energie agitadis por lingvaj rajtoj; ĝiaj membroj ne hezitis protesti ankaŭ per leĝrompado, tiel ke pluraj sidas hodiaŭ en karceroj. Plej laste la agitado direktiĝis unuavice al la postulo por kimralingvaj vojindikoj (registara komisiono nun rekomendis dulingvajn, kun la kimra nomo en unua loko), kaj por kimralingva televida kanalo.

La situacion en ekskoloniaj landoj de la Tria Mondo priskribis por Afriko d-ro Jan Knappert de la Universitato de Londono. La teksto de la referaĵo, kiun voĉlegis al la ĉeestantaro s-ro Ivo Osibov, estas trovebla en la revuo *La Monda Lingvo-Problemo* (1970), n-ro 4, pĝ. 35-37. En tiu referaĵo d-ro Knappert priskribas la grandajn lingvajn problemojn de Afriko, kun ĉ. mil lingvoj kaj ĉ. 280 milionoj da loĝantoj. La plej vaste parolataj lingvoj estas la araba, la haŭsa, la amhara, la svahila, la joruba, kaj la zulua, en tiu ordo. La sendependiĝo trafis Afrikon kvazaŭ neatendite. La novaj naciaj registaroj plejparte simple deklaris la ekzistantan eŭropan lingvon la oficiala lingvo de la ŝtato. En aliaj kazoj ili decidis favore al ekzistanta interlingvo: la svahila en Tanzanio, la araba en Sudano. Por igi iun lingvon oficiala, tamen, ne sufiĉas nomi ĝin tia—en kelkaj landoj nur eta malplimulto scipovas ĝin (en Zairo 2% la francan, en Kenjo eble 4% la anglan). Analfabeteco kaj manko de instruistoj komplikas la problemojn. Lingva unueco, anstataŭ esti atingita per kaj por la unueco de la nacio, ŝajnas forglitadi en ĉiam pli malproksiman estontecon. En letero d-ro Knappert aldonas, ke li samopinias ankoraŭ kun la pesimisma tono de sia artikolo, kvankam la pozicio kaj prestiĝo de la svahila en Tanzanio kaj Kenjo nun progresas (pli da homoj parolas ĝin kun pli da memfido kaj pli korekte; la Prezidanto uzas ĝin en ĉiu parolado; sed en metodiko de edukado kaj en prestiĝo ĝi ankoraŭ postrestas la anglan). Nun multaj angle-parolantoj foriras el Orienta Afriko, tiel ke la bezono por la angla malkreskas.

D-ro Wells agnoskis la helpon, kiun en la preparado de la raporto li ricevis de la revuo LMLP kaj de la verko *The Ecology of Language* de Einar Haugen (Stanford, Kalifornio, 1972). Poste sekvis 45-minuta diskutado, kun intervenoj de d-ro Borovečki kaj s-ino Bošković (Jugoslavio), prof. d-ro Sevak (Sovetunio) kaj aliaj.

DEBATO: “ĈU ESPERANTO POVAS
SUKCESI SEN LOKAJ GRUPOJ?”:

Esencas nova enhavo

La jam tradicia kongresa programero DEBATO ĉi-foje okupiĝis pri la temo “Ĉu Esperanto povas sukcesi sen lokaj grupoj?”. En ĉeesto de ĉ. 350 gekongresanoj, prezidis d-ro W. Bormann, kaj raportis s-roj G. Becker kaj E. J. Woessink; la diskuton partoprenis 11 personoj.

Unu el la du enkondukaj raportintoj, s-ro Woessink, defendis la tezon, ke la Internacia Lingvo ja povas sukcesi sen la plua ekzistado de la lokaj grupoj, ĉefe argumentante per la fakto, ke la hodiaŭa mondo spertas grandajn ŝanĝojn, dum niaj societoj apenaŭ ŝanĝiĝis. Li atentigis pri la grava rolo, kiun la tradiciaj lokaj grupoj ludis en la historio de la movado, sed ankaŭ pri novstilaj taskoj, ligitaj al la evoluo de la mondo kaj de nia movado, kiujn ne povus bone plenumi la ĝisnunaj grupoj, sed por tiu nova agado estu fonditaj alispecaj grupoj, unuiĝoj aŭ institucioj. La Ĝenerala Sekretario de UEA, s-ro G. Becker, en sia enkonduka raporto atentigis, ke ankoraŭ ĉiam restas amaso da taskoj, kiujn povas bone plenumi la lokaj grupoj, kiuj ankaŭ laŭ li ludis gravegan rolon en la historio de la movado. Li atentigis, ke la nun valida laborplano de UEA antaŭvidas tutan aron da taskoj por la lokaj grupoj, kiuj en siaj lokaj kadroj eĉ mem ellaboru laborplanojn, kiuj estu konkretigo de la samnomaj dokumentoj de UEA kaj la Landaj Asocioj. S-ro Becker atentigis, ke, laŭ li, restas sole la demando, kiamaniere certigi ankoraŭ pli sukcesan funkciadon de la lokaj grupoj.

Vigligi kaj modernigi

En la vigla, sed bedaŭrinde ne ĉiam serioza diskutado, kiu sekvis (unu el la diskutintoj kantis pensojn de sia filineto), evidentiĝis, ke la ĝenerale reganta opinio estas tiu, kiu pledas por la konservo de la nunaj lokaj grupoj, kies agadon oni vigligu kaj modernigu. Pluraj prave atentigas, ke ne nepre necesas nova organiza formo por doni novan kaj modernan enhavon al la laboro de la lokaj grupoj. Aparte estis emfazite, ke estas ĝuste la lokaj grupoj tiuj, al kies ekzisto kaj funkciado ŝuldiĝas la evoluo kaj konservo de la vivanteco de Esperanto. Cetere, la ekzisto kaj aktivado de la lokaj grupoj neniel malhelpas estiĝon kaj funkciadon de alispecaj agadgrupoj por la Internacia Lingvo.

Aparte menciindas, ke inter tiuj, kiuj defendis la pluan funkciadon de la lokaj grupoj, troviĝis ankaŭ juna kongresano, s-ro H. Klünder (FR Germanujo), kiu jam dum pluraj jaroj gvidas la junularan sektion de GEA.

Nostalgiaj pensoj pri IAT

Post tio, kion ni vidis en la TEATRA VESPERO de la 58-a UK en Beograd, eĉ la plej vervaj pledantoj pri la ekzisto de aparta "Esperanto-kulturo" devus silentiĝi, almenaŭ kiam temas pri la teatro. Ĉio tie vidita kaj spertita dum tiu vespero estis ne nur sub la nivelo de la hodiaŭa teatra arto sed ankaŭ sub la nivelo, kiun kutimis atingi teatraj vesperoj dum niaj kongresoj.

Iom strange, ke tiel okazis, des pli ke per la tiel malbona teatra programo la kongresanojn regalis la Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb. Ĉar tiu Klubo ja estas ia natura heredinto de la gloro, kiu iam apartenis al la jam fabeliĝinta Akademia Esperanto-klubo de Zagreb. Ankaŭ nun ne necesas aparta kuraĝo por aserti, ke la hodiaŭa Klubo de la zagrebaj studentoj sendube estas unu el la plej bonaj esperantistaj societoj en la mondo. Ĝi estas tiu societo, al kiu oni danku la ekziston de la larĝe konata pupteatra festivalo, kies sola teatra lingvo estas Esperanto; el la sino de tiu sama Klubo venas ankaŭ la Internacia Kultura Servo, kiu sub la emblemo IKS publikigis en unu sola jaro almenaŭ kvin librojn kaj tiel fariĝis momente la plej diligenta Esperanta eldonejo; fine, la Drama Sekcio de la Klubo ankaŭ havas almenaŭ dekjaran tradicion kun aro da sukcesaj enscenigoj, kiuj iam estis la sola serioza konkurenco al la tiutempe aktivanta Internacia Arta Teatro, kiu mem ofte kompletigis sian teamon per amatoroj de la Drama Sekcio.

Branislav Nuŝić (1864–1938), la serba Molière, la plej granda komediverkisto en la historio de la serba literaturo, kies verkoj ankoraŭ ĉiam suverene regas la jugoslaviajn scenejojn, — tia aŭtoro de la kongresa teatraĵo "Aŭtobiografio" estis pli ol trafa elekto, plaĉa ankaŭ por tiuj, kiuj siatempe kritikis IAT pro troa pezo de la pecoj en ĝia repertuaro. "Aŭtobiografio" ne apartenas al la vico de la plej sukcesaj produktaĵoj de Branislav Nuŝić, kies ĉefverkoj portas stampon de forta loka koloro, kaj sekve ne estas facile sekveblaj por tiuj, kiuj ne konas la historian fonon de liaj komedioj. Ĝuste tia, "Aŭtobiografio" restas la plej facile digestebla verko de Nuŝić, konvena eĉ por tiel bunta publiko, kia estas la kongresa. Krome, apud leĝera, facile komprenebla humuro, "Aŭtobiografio" havas ankaŭ malskeman formon,

ĝi estas loza anekdotaro, simpla juneca foto-albumo de la aŭtoro, kio ĝin faras muldebla laŭplaĉe, loga por eksperimentema reĝisoro, unuavide plej facile surscenigebla verko de Nuŝić, sed aliflanke - ĝuste pro tio - la plej danĝera duelo kun la granda komediisto. Tamen, tio, kion oni prezentis en Beograd, ne estis nur Nuŝić kaj lia "Aŭtobiografio". Reznigante pri pluraj scenoj de la originala verko, la reĝisoro plektis en ĝin plurajn alineojn el freŝe aperinta furora libro (6 represoj en unu jaro) "La Kraĵono skribas kore", konsistanta el prae logikaj kaj — sekve — superbe poeziecaj respondoj en enketo farita inter 4 — 12-jaraj geknaboj. Krome, la spektaklo finiĝis per superflua parado de fosiliaj eldiroj pri la geedza vivo, kiujn aŭtoris la plej moŝtaj nomoj de la monda literaturo. Ĉio ĉi ne nur ne necesis, sed efektive ĝenis, kiel dirite, la jam lozan originalan tekston, kiu nur en la manoj de bona reĝisoro atingas la bezonatan kvanton de kohero. Ankaŭ la tradukinto de "Aŭtobiografio" faris malbonan servon al Nuŝić — oni aŭdis malglataĵojn kaj erarojn kiel: "Unu tagon mi renkontis unu amare plorantan knabinon" aŭ "Mia amo ne finis".


La komenco de la vespero, tiu moderneca revuo de geaktoroj en preskaŭ ĉiutagaj kostumoj, aŭguris rendevuon kun ĝisdata reĝisora koncepto kaj petola teatra spektaklo. Sed ĉio baldaŭ ŝrumpis al ordinara diletanta strasaĵo, por apenaŭ kelkfoje leviĝi ĝis tolerbla teatra nivelo. La du ĝueblaj momentoj de la vespero estis la rolo de Mladen Ŝerment, konata zagreba aktoro kaj reĝisoro de tiu ĉi spektaklo, en la tria parto de la komedio kaj — eĉ pli ol tio — kelkaj scenoj en la lerneja klaso: tiuj, en kiuj rolis la fratoj Kruno kaj Zlatko Tiŝljari, tutcerte du purrasaj komediaj tipoj (malgraŭ ke Zlatko Tiŝljari estas la animo de ĉiuj lastatempaj seriozaj atingoj de la zagreba Klubo). Ankaŭ Vesna Staniĉić-Weide, spite al sia raŭkeco, kontentige rolis la instruistinon. Se necesas plie illustri la mankojn de la spektaklo, oni ne rajtus preteratenti la parton pri la unua ĝis dektria amoj, kiu, ĝuste pro modernecaj reĝisoraj aspiroj, fariĝis la plej neta fuŝo de la vespero. Parolante ĝenerale, la plej granda manko de la spektaklo estis kompleta foresto de kia ajn ritmo.

Tamen, se serĉi akcepteblajn pravigojn pri la malsukceso de la zagreba Drama Sekcio, oni menciunuavice la nekutime grandan salonon, en kiu preskaŭ du mil seĝoj estis okupitaj. Ankaŭ la scenejo, kiu origine ne estas antaŭvidita por teatraj spektakloj, per sia grandeco ofte embarasis la aktorojn. Krome, nur fine de majo ĉijara, la Drama Sekcio estis certa, ke ĝi prezentiĝos dum la Kongreso, kaj — por tia ambicia projekto — du monatoj estas mallonga preparperiodo eĉ por profesia teatra grupo.

Dum la prezentado okazis minimume 14 aplaŭdoj. Per tia aplaŭdo-bilanco povus fanfaroni kiu ajn gvida teatro de monda renomo, kvankam ni pretas ĝin konsideri neta pruvo, ke kun la degenero de nia dumkongresa teatro, degeneras ankaŭ la teatra gusto de la kongresanaro. Por multaj denove ŝajnas sufiĉi, ke Esperanto nur aŭdiĝu de sur scenejo, por tion priaplaŭdi, kvankam tiuj tempoj devus esti kaj estas jam delonge for. Malgraŭ ĉio, en Beograd oni kun nostalgio pensis pri ne nepre la iama, sed iu nova IAT, kiu nian teatran kulturon relevu al kultura nivelo.

S.M.

Sceno el "Aŭtobiografio" de Nuŝić; dekstre deklamas la reĝisoro, la iama IAT-aktoro Mladen Ŝerment.





DELICA REVUO DE JUGOSLAVIA FOLKLORO

Unesko-kuriero de junio ĉi-jara publikigis artikolon de Dmitri Ŝostakoviĉ, en kiu la fama soveta, aŭ pli bone - la monde fama komponisto, revuis siajn pensojn pri "muziko sen limoj". Ŝostakoviĉ uzis la enkondukajn alineojn de tiu artikolo por detrui establigintan kutimon nomi ne nur la industrian, sed ankaŭ la kulturan staturon de la landoj de Azio, Afriko kaj Sudameriko - subevoluinta. La genia komponisto neas al Eŭropo kaj Nordameriko la rajton patronece uzi la epiteton "evoluanta", kiam temas pri la artaj komponantoj de kulturo. Se permesate grefti la penson de Ŝostakoviĉ sur nian arbon, sekvus refoja aserto, ke la evoluinta mondo aplombe, uzurpe kaj aroge identigas la industrian civilizon kaj ĝian ventroplenan bonfarton kun la netaj valoroj, kiujn jarmiloj sedimentigis en la kulturoj de la t.n. evolulandoj. Se vi foje vidis, almenaŭ en filmo aŭ televido, senegalan aŭ hindan dancon - vi komprenos, pri kio ni parolas.

Laŭ ekonomiaj metroj, Jugoslavio estas evoluanta lando; ĝi estas tio eĉ laŭ sia konscia politika ligiĝo dum la lastaj 25 jaroj. Sed, laŭ siaj kultura kaj arta trezoroj, ĉi tiu orient-okcidenta kaj nord-suda lando prave atendas pli justan klasifon en la historio de la mondkulturo. Al tiaj pensoj, interalie, instigis ankaŭ la JUGOSLAVIA VESPERO, en la komenco de la kongresa semajno en Beograd.

La danco mem estas stranga fenomeno. Pluraj, kiuj meditis pri ĝi, pretas aserti, ke la danco estas kulmina, ekstaza esprimilo de la homa ĝojo. Se pravus la meditemuloj, estas ĝuste la jugoslaviaj popoloj tiuj, kies dancoj plej efike refutas la teorion. Jes, ĝojo enestas la nunan formon de tiuj dancoj, sed ĝi certe ne estis la florbedo, el kiu ili ĝermis. Sur tiu vojkruciĝa areo, tiu plurjarcenta batalkampo inter la du hemisferoj, inter religioj, ideologioj, strategiaj, politikaj kaj ekonomiaj interesoj - sufero estis la ovŝela definitivo, kiu elkovis eĉ la plej inferoritmajn dancajn petolaĵojn. Bone informitaj okulo kaj orelo ankaŭ nun sentas tion en la abrupte tranĉitaj paŝoj kaj violonaj sordinoj.

Por tiuj, kiuj ne tre ofte, kaj precipe por tiuj, kiuj unuafoje renkontiĝis kun la jugoslaviaj popoldancoj, la JUGOSLAVIA VESPERO sendube estis, tute sen rezervoj - la plej kompleta, la sola vere arta travivaĵo dum la kongresa semajno. Necesas ankaŭ ĉi tie laŭdi la decidon de la kongres-organizantoj enprogramigi ĝuste tian vesperon, kaj eble ĝuste tiun ensemblon. Eĉ kun repertuaraj mankoj (se la celo estis prezenti la tutan landon, tiam forestis dancoj el Slovenio kaj Montenegro), la vespero estis la plej tipa, plej spektakla kaj la plej trafa maniero, ke la kongreslando prezentiĝu al la kongresantoj. Pri tiu tipeco de la kongreslanda vespero oni devus pensi ankaŭ dum la sekvantaj kongresoj.

Ensemblo multmedala

Sed, ni reiru al la programo de tiu vespero kaj la ensemblo, kiu plenumis ĝin:

La Folkloro Ensemblo "VUKICA MITROVIĆ", kreskinta en la sino de la plej granda konfekcia firmao de Jugoslavio — BEKO el Beograd, kiu patronis ankaŭ la kongresan koncerton — ekzistas jam dudekon da jaroj. Ĝia historio jam notis ĉ. du mil koncertojn por proksimume tri milionoj da spektantoj, 5 orajn, 5 arĝentajn kaj 4 bronzajn medalojn en internaciaj konkursoj. Tamen, tio, kio plej nete ŝokas ĉe la ensemblo, estas la fakto, ke ĉiuj ĝiaj anoj estas laboristoj de la firmao BEKO, kio signifas, ke ili estas amatoraj dancistoj, kaj ke ilia meza aĝo estas 18 jaroj. Kio plie ŝoku la spektantojn de la koncerto kaj niajn legantojn - estu nia informo, ke "VUKICA MITROVIĆ", jes, estas unu el la plej bonaj ensambloj el plurdeko da tiaj, aktivantaj en la jugoslavia ĉefurbo, sed ĝi estas ankaŭ nur unu el pluraj centoj aŭ eble tuta milo da tiaj ensambloj en la lando. Ĉion ĉi ni diras, ne kun celo malgravigi la ensemblon, kiu ravis nin, sed kun emo substreki la feliĉan fenomenon, ke oni en Jugoslavio ankoraŭ ĉiam tiel bone kaj tiel grandskale flegas la popolan dancarton.

KONGRESLANDA VESPERO

La programo mem komenciĝis per bukedo da serbaj dancoj, kiun delikate kaj impresolase prezentis 13 geaj paroj en filigrane delikataj kostumoj. Tiu amaseco de la dancantaj paroj estas la ĝusta tono por la komenco de ĉiu koncerto de la jugoslaviaj dancoj. Eĉ por tiuj, kiuj ofte rigardas similajn spektaklojn, la finalo de ĉi tiu programero montriĝis koreografie nova. "Ĉifte, Ĉamče", tiel nomiĝis la dua programero, tiu kun spirhaltigaj, longdaŭraj ŝvebaj paŝoj kaj surprizaj kadencoj, tiu, en kies komenco la tuta vira parto de la Ensemblo transformiĝas en unu solan korpon, krokizantan siajn sentojn tra la iam plumbe prema aero de la turka jugo. La finaj scenoj de tiu majesta makedona danco fariĝis delikaĵo eĉ por la plej bonaj konantoj de ĉi tiu arto. Sekvis edziĝfesta kaj aliaj dancoj el Kroatujo, kiuj estis plenumitaj duone sur la podio, kaj duone en la aero. Sendube la plej gajaj, plej proksimaj al la gusto de okcidentanoj (kiuj estis la plimulto en la salono), prezentitaj majstre kaj kvazaŭ unuspire, la kroataj dancoj elvokis vere tondrajn aplaŭdojn de la ravita spektantaro.

Dancoj el Vranje kondukis sur la scenejon la tutan Ensemblon, kun ĉiuj gedancistoj, por prezenti koŝmaran* spektaklon el belo, orientdevena erotikeco, klopodon de dancistinaj manoj dementi la fakton, ke en ĉiuj jugoslaviaj dancoj ĉefrolas la piedoj. Kun forta turka aromo en la dancoj kaj precipe en la muziko, kun silka kaj ora briloj de la turkdevenaj kostumoj, Vranje estis la plej ekzotika el la prezentitaj dancoj, la virina parto de la Ensemblo havis en ĝi pli malfacilan rolon, sed plenumis ĝin pli bone.

En la paŭzo inter la du programpartoj, oni kredis jam esti vidinta tion, kio estas la plej bona en la jugoslavia popoldanca arto. Tamen, katapultita tamburisto per ekstazaj korpokirloj anoncis alvenon de Makedonio, folklore la plej riĉa, ritme unika kaj kostume senprecedenca jugoslavia provinco. En tiu danco, la viroj subite estas vico de kverkoj rezistanta al uragano, la virinoj fariĝas petola bosko de tremoloj, la unuaj paŝas palpe, ŝvebe, la duaj punte, brode, en la orkestro interparolas dampita violono kaj raŭkiĝinta klarineto. Ĉio ĉi estas paradoksa miksaĵo de malgajo kaj deliro, eble tamen la plej brila, la kulmina ero en la programo.

Kiuj ritmojn portas en la sango

La malnova senmuzika danco el Bosnio, kies sola akompano estis la tintado de virinaj ornamaĵoj kaj la reeĥo de la viraj paŝoj, helpis al la publiko deĉifri la sekreton de la vespero: en tiu danco montriĝis klare, ke la gedancistoj kaj popoloj, kiujn ili reprezentis, siajn ritmojn portas en sia sango. "Sota" kaj aliaj albanaj dancoj estis rafina surscenigo de la amaj tenero kaj kruelo samtempe. Tiu programero estis kompleta, plurakta lirika dramo, kiun la Ensemblo elokvente komunikis al la publiko.

La spektantaro jam estis laca de troa belo, eluzinta ĉiujn siajn komplimentojn por la pli ol profesinivelaj amatoroj, kiam sursceniĝis "Šopske igre" el la orienta Serbio. Ilia freneza, pereiga ritmo ree pruvis la mezaĝon de la gedancistoj, ĉar, ĉe la fino de duhora koncerto, nur 18-jaruloj kapablas tiel senŝpare, trance fordiboĉi sian forton, tiel pompi per sia lerto, tiel jongli per siaj korpoj. Tiu danco estis la spektakla

* koŝmaro: inkubsonĝo

kulmino de la vespero, neta triumfo de la Ensemblo, kiu per ĝi entrancigis ankaŭ la publikon, kiu per ovacioj sukcesis ripetigi la dancon.

Ankaŭ la interludaj programeroj, la kantado de la pupe bela Gordana Pejić, kun kristale pura, forta voĉo kaj ellaborita kant-tekniko, la malnovaj urbaj kantoj prezentitaj de Duško Ljubičić, kiu majstre kombinis koncertan dignon kun intimeco konkeranta la publikon, kaj precipe la orkestro, kun du diablaj violonistoj kaj unu freneza akordiono, ili ĉiuj kontribuis, ke la koncerto de la Folkloro Ensemblo "VUKICA MITROVIĆ", tiu JUGOSLAVIA VESPERO en Beograd, fariĝu ne nur la plej brila ero de la kulturaj aranĝoj dum la Kongreso, sed ankaŭ modelo por estontaj kongreslandaj programoj.

Aparta regalo por la okuloj estis la kostumoj de la gedancistoj: ĉiu nova programero venigis sur la scenejon kompletan mod-revuon de la kostumoj de alia jugoslava popolo aŭ minoritato, precipe ĉe la virinoj neniam uniformecan, sed varian de dancistino al dancistino. Kaj la kostumoj, kun eventuala escepto de tiuj uzitaj en la dancoj de Vranje (ĉe kiuj pompas la ekzotikeco de la koloroj), ĉiu el ili estas majstroverka fajnaĵo, ĉiu surhavas brode komunikitan historion de la koncerna popolo, kolore esprimantan sentogamon, fadene katenitan korbato. La tuta kostumaro de la Ensemblo povus translokiĝi en kiun ajn etnografian muzeon de la mondo, ĝi povas esti revo eĉ de la plej postulemaj hipiaj dandoj de la nuntempo.

La mankon de presita programo provis anstataŭi du junaj, kostumitaj LKK-anoj, Svetlana Ŝaponjić kaj Radojica Petrović, sed ili tion faris iom anemie, sen la necesa vervo, kiu estis la ĉeftraĵto de la vespero.

S. Milojević



TROA OSCILADO DE KVALITO

La du tutvesperaj kongresaj aranĝoj, kun senpreten-
daj nomoj, ambaŭ estis variaj kaj samtiel ambaŭ
internaciaj. La internacieco estas atendebla kaj bon-
vena en tiaj ĉi kongresoj, kion oni povus diri ankaŭ
pri la varieco, esceptante, tamen, almenaŭ unu ĝian
aspekton - tiun, kiu rilatas la variecon en la kvalito de
la prezentitaj programeroj. Nome, en la du aranĝoj
estis sinsekve prezentataj programeroj kun enviinda
profesia nivelo, kaj ankaŭ tiuj kun apenaŭ tolerebla
amatoreco, kiu eble eĉ ne ĝenus la spektantojn, se la
roluloj konscius pri ĝi kaj klopodus rekte enkasigi la
ĝeneralan simpatiecon de la publiko al la amatoroj.

LA VARIA VESPERO okazis en la mezo de la kon-
gresema semajno, do antaŭ pluraj aliaj distraĵoj kaj kultu-
raj programeroj de la Kongreso, kaj logis al la
kongreseja ĉefsalono minimume 1500 gekongres-
anojn, malgraŭ tio, ke samtempe, en alia konstruaĵo,
okazis la ĉiam populara "Junulara Vespero". La ko-
menco de la vespero apartenis al la Drama Sekcio de
la Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb, kiu regalis
la spektantojn per du bone luditaj burleskaĵoj, kiuj -
tion montris aplaŭdoj kaj spontaneaj rideksplodoj -
efektive plaĉis al la spektantoj. Almenaŭ unu el tiuj
skeĉoj, la unua, estis jam vidita en aliaj internaciaj
renkontiĝoj, kvankam tio neniel ĝenis, ĉar temis pri
unu el tiuj literaturaj senvaloraĵoj, kiujn oni rapide
forĝas kaj ĉiam denove povas ĝui. En ambaŭ
komediaĵoj elstaris la cetere malalta Zlatko Tišljar,
kiu verŝajne mem ne kulpas pri la fakto, ke li havas

terure rigidajn kaj voĉon kaj mienon. Li verŝajne
farus brilan komedian karieron, se li jam ne estus
elektinta la seriozan karieron de la ĉefgvidanto de la
Klubo. Pretere dirite, restas iom nekompreneble, ke
la Drama Sekcio tiel sukcese prezentiĝis en la Varia,
kaj tiel diletantisme en la Teatra Vespero.

Ankaŭ la bulgara geaktora paro, Belka Beleva kaj
Anani Anev, prezentiĝis per prifutbala komediaĵo,
kian temon havis ankaŭ la dua komedieto de la
Drama Sekcio de SEK. Ges-roj Beleva kaj Anev sian
programeron prezentis profesie, en iom eksmoda
aktormaniero kaj ne ĉiam perfekta lingvaĵo. Sekvis
du japanaj programeroj, el kiuj la unua - la kanta -
impresis ĉefe pro sia ekzotikeco, kaj la dua - la
sporta - malgraŭ ĉio, ne devis ankaŭ tiudirekten
variigi la programon.

Budapeŝta bukedo

Virina kant-grupeto el Budapeŝto, sub la gvido de
s-ino Rita Barabas-Ingusz, prezentis bukedon de
diversoriginaj kantoj, de mezepokaj madrigaloj ĝis
komponaĵoj de Bartok kaj du jugoslaviaj kantetoj.
Ĉio estis kantita en esperantlingva traduko, kun vera
koncerta digno, kion ne apogis la tro buntaj, ĉiutagaj
vestaĵoj, kaj kio ĝenerale malbone akordiĝis kun la
karaktero de la Vespero. (Tiu ĉi programero tut-
certe pli bone konvenus al la Internacia Vespero). Se
la budapeŝta koruseto estus havinta ankaŭ bonan
teknikan reĝisoron, kiu en konvena maniero pri-
manipulus la mikrofonojn, ĝia sukceso estus pli
granda, sed tamen - ĝuon estis aŭdi la budapeŝtajn
kantistinojn.

La ideo organizi apartan internacian kantvesperon
estis plukita dum la Kongreso en Londono, kie ĝi
brile sukcesis. Tamen, la beograda INTERNACIA
VESPERO estis nur pala ombro de la londona. Al tio
grandparte kontribuis la salono, kies grandeco sub-
taksis preskaŭ ĉiuj partoprenantoj en la programo
(por ne diri, ke almenaŭ kelkaj el ili supertaksis sian
voĉkapaciton).

La plenplena salono, kio signifas, ke la programon
ĉeestis ne nur ĉiuj kongresanoj, sed ankaŭ centeto da
gastoj, plej varme akceptis la kantadon de dueto el la
opero "La Barbiro de Seviljo" de Rossini, kiun,
muzike kaj aktore bone, prezentis la bulgara kantist-
ino Angelova kaj la ĉeĥa kantisto Smyčka. La jugos-
lavia kantisto Đorđe Minov, sendube la plej valora
voĉo de la Vespero, per sia riĉa, bele prifacitita
tenoro, prezentis italajn kaj jugoslaviajn klasikaĵojn.
Restas por bedaŭri, ke la organizantoj de la Vespero
permesis, ke ĝuste tiu jugoslavo estu la sola program-
anto, kiu ne kantis en Esperanto. La aliaj operkant-
istoj: Grabner (Aŭstrujo), Smyčka (Ĉeĥoslovakujo),
Zielonka (Pollando) kaj Karaĝozov (Bulgarujo), ne
sukcesis per siaj voĉoj venki la volumenon de la
salonego, kion parte faris nur la bulgaro Karaĝozov,



Krom la bazaj dokumentoj de ĉiu Universala Kongreso — la
Kongresa Libro kaj la Estrara Raporto de UEA — la atenton de
la beogradaj aliĝintoj kaptis komercaj kaj turismaj reklamiloj,
ekzemple ĉi tiuj faldfolioj de la aerkompanioj JAT (Jugoslavio)
kaj LOT (Pollando). Tiu lasta havis la formon de 4-lingva fraz-
areto por aervojaĝantoj — de "Kie ni estas?" ĝis "Mi amas vin."



Margaret Hill, jam tutmonde konata pro du tre plaĉaj popolkantaj diskoj en Esperanto, havis plian sukceson sur la beograda scenejo. Dekstre, akompanas David Hill bekflute.

ne per sia voĉo, sed per ritma aplaŭdado de spektantoj, kiuj tiamaniere akompanis lian prezenton de konata rusa melodio. Se paroli pri akompano, oni ne rajtus preterlasi la mencion de la beograda pianisto Feodorović, kiu akompanis ĉiujn kantistojn en la unua parto de la programo kaj tiun malfacilan taskon bonege plenumis. La programon partoprenis ankaŭ la franca pianisto Roland Dupuis, kiu estas pli-malpli konstanta programanto en niaj kongresoj, sed ĉi tiun fojon, almenaŭ Liszt ne sonis aparte elstare sub liaj fingroj.

La brila ero de la dua parto de la programo estis la brita kantistino Margaret Hill, kiu kun propra gitara akompano (kelkloke helpis ankaŭ ŝia edzo, flute) lerte kaj ĉarme prezentis manplenon da popolkantoj el pluraj partoj de Britujo. Krom la bela voĉo kaj ellaborita kanttekniko, Margaret Hill posedas ankaŭ tiun sugestoplenan koncertan senperecon, kiun ankaŭ la beograda publiko ne sukcesis rezisti. Ŝi estas la Esperanta Joan Baez. Cetere, ŝajnas, ke ĉio, kion ŝi kantis en Beograd, troviĝas sur ŝia nova longdaŭra disko, aperinta antaŭ nelonge.

La kvinmembra "Kvarteto Esperanto", kun siaj mikrofonoj kaj amplifiloj, ne estis ĝenata de la salona grandeco. En simpatia, kelkfoje eĉ romantikeca maniero, sen la troa bruo de la modernaj muzikbandoj, la "Kvarteto" prezentis kante kaj instrumente plurajn kanzonojn kaj moderne aranĝitajn popolkantojn. Ĝi akompanis ankaŭ la bulgaran kanzoniston Mišo Zdravev, kiu almenaŭ per siaj profesiaj podiaj gestoj sciis provoki aklamojn de la aŭditorio. La programo finiĝis per tri jugoslaviaj (bosniaj) kantoj, kiujn prezentis belvoĉa, sed kun mikrofono malfeliĉa Saveta Đorđević.

Ambaŭ vesperojn, kaj la Varian kaj la Internacian, gvidis s-ino Jelena Šaponjić, en kies avaraj prezentaj vortoj oni bele sentis, ke ŝi dum la kongresaj tagoj estis elĉerpita per aliaj laboroj.

LA 26-a SESIO DE LA INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO:

Impona nombro da aŭskultantoj

Ankaŭ ĉi-jare montriĝis, ke la Internacia Somera Universitato, kies 26-a sesio dumis la kongresan semajnon en Beograd, estas unu el la plej valoraj eroj en la kongresa programo. En ĝia inaŭguro, la ĉi-jara rektoro, prof. d-ro Boža Popović, parolis pri la unuecigaj kaj malunuecigaj procezoj en la hodiaŭa mondo. Li akcentis, ke la uzo de naciaj lingvoj en la scienco estas kontraŭdira fenomeno, ĉar la scienco mem klare montras unuecigajn tendencojn.

La valoron kaj aktualecon de la programo de ISU akompanis ankaŭ adekvata populareco, kiun plej bone ilustras la fakto, ke la granda kaj konvena salono "Grabovski" (tie okazis ĉiuj 8 prelegoj), dum la kongresa semajno allogis pli ol 1100 aŭskultantojn, kio signifas, ke ĉiun prelegon ĉeestis meznombre ĉ. 140 personoj, nombro sendube impona. Tamen, la nombro de la ĉeestantoj grave variis de prelego al prelego, irante de kvardeko da aŭskultantoj, kiuj interesiĝis pri la efektive tro faka temo (fotogrametrio) de la prelego de prof. Vasil Peevski (Bulgarujo), ĝis 350 aŭskultantoj en la prelego de ambasadoro Ralph Harry (Aŭstralio), kies temo estis "Evoluo de la internacia juro pri la maro". La aliaj prelegintoj logis samtiel malsamajn nombrojn da ĉeestantoj: d-ro H.M. Maitzen (Aŭstrujo), "Oro kaj alkoholo en la kosmo" — 200, G. Sređić (Jugoslavio), "Ekonomieco de transporto de varoj en konteneroj" — 70, prof. R.A. Lewin (Usono), "Glitivaj mikroboj" — 120, d-ro W. Bormann (FR Germanujo), "Internacia komerco kaj valutoj" — 120, O. Haszpra (Hungarujo), "Modeleksperimentoj kiel modernaj helpiloj de la hidroteknika planado" — 60, prof. A.P. Thewrewk (Hungarujo), "Biblio kaj astronomio" — 160 aŭskultantoj.

Kvankam la programo mem de la ĉi-jara sesio de ISU iom pli favoris la t.n. ekzaktajn sciencojn kompare al la humanismaj fakoj, pro la forfalo de du prelegoj, kiuj ne okazis pro la foresto de la prelegantoj (prof. d-ro I. Lapenna: "Bazaj juraj aspektoj de la eŭropaj organizaĵoj" kaj d-ro M.V. Stojanović: "La mezepoka serba eposa heroo Marko Kraljević en balkanlanda folkloro"), tiu malekvilibro estis pli okulfrapa.

Sukcesa oratora konkurso

Yoda
kumiko el
Japanujo
konkeris la
publikan
simpation —
kaj la duan
premion.



Ne laŭ la nombro de la partoprenintoj, ĉar ili ĝuste sufiĉis por disdividi la tri premiojn, sed laŭ la kvalito — oni povus kontenti pri la ĉi-jara Oratora Konkurso. Proksimume 300 kongresanoj, kiuj ĉeestis la Konkurson, aplaŭde montris, ke ili samopinias kun la prezidanto de la prijuĝa komisiono, akademi-ano Roger Bernard, kiu anoncis la rezultojn. La unuan premion gajnis la novzelandano MacGill, kies nomo estos gravurita sur la "Pokalon Ivo Lapenna". En perfekta lingvo, kun preskaŭ "lapennecaj" gestoj en la komenco, li kun adekvata vervo defendis la poziciojn de la hodiaŭa junularo, klopodante respondi al la preskaŭ provoke formulita titolo de la unua konkursa temo: "Kion celas la hodiaŭa junularo?". La saman temon traktis ankaŭ la gajninto de la dua premio, f-ino Kamiko Yoda (Japanujo). Ŝi sukcesis konkeri la simpatiecon de la publiko, kaj ŝajne ankaŭ tiun de la prijuĝantoj, ne per lingva perfekteco, sed ĉefe per la ofte tre poezieca maniero, en kiu ŝi prezentis siajn ideojn, kaj per sia persona ĉarmo. La gajninto de la tria premio, s-ro Ian Carter (Britujo), elektis la temon "La studentaro kaj la ĝenerala publiko". Lia oratoraĵo distingiĝis per eminenta prononco, sed ĝi estis prezentita sen oratora tono, konversacie, kun babilaj nuancoj. Kvankam enhance interesa, ĝi restis amorfa rilate la formon.

Kvankam oni pli multe ĝuus oratoran konkurson kun iom pli da konkursantoj ol da disponeblaj premioj, la kvalito de la ĉi-jaraj partoprenintoj, venintaj el tiel disaj partoj de la terglobo, plene kontentigas. Tamen, restas nekompreneble, ke la esperantista junularo ne eluzas la podion de la Oratora Konkurso, se ne pro oratoremo, tiam almenaŭ kiel ŝancon alparoli la kongresanojn kaj pledi por siaj ideoj. Kie estis TEJO-anoj por ekspliki la celojn de sia generacio en la kadro de la Oratora Konkurso en Beograd? Ĉu mankis kuraĝo al ili? Oratoraj Konkursoj ne estas sole arta aranĝo, sed ili estas ideala loko por konvinki, eksponi novajn ideojn, eĉ por trudi siajn starpunktojn. Oni ne povus plendi, ke la temoj de la ĉi-jara Konkurso estis neinteresaj kaj maltrafaj. Maltrafis TEJO, kiu estonte devus organizite popularigi la Konkurson kaj instigi al partopreno en ĝi.

Magra belarta rikolto

Malgraŭ tio, ke la ĉi-jarajn Belartajn Konkursojn partoprenis pli da aŭtoroj ol dum kelkaj antaŭaj jaroj (56 aŭtoroj el 26 landoj sendis 109 konkursaĵojn), la rikolto ne estis aparte kuraĝiga, almenaŭ ne kiam temas pri la kvalito. Kiam la sekretario de la Belartaj Konkursoj, s-ino E. Lapenna, en la ĉeesto de ĉ. 250 kongresanoj, proklamis la rezultojn, estis okulfrappe, ke oni en neniu el la tri konkursaj branĉoj aljuĝis la unuan premion. Plena "katastrofo" okazis ĝuste en la branĉo, kiu en nia literaturo havas la plej brilan tradicion — neniu tradukita poeziaĵo gajnis premion! Tamen, post multaj senpremiaj jaroj, ĝojigas la premio en la branĉo de originalaj dramoj. La premiitajn verkojn legis ges-roj E. Lapenna, R. Bernard kaj A. Venture.

Se serĉi kialojn de la magra rikolto de belartaĵoj, oni povus noti la foreston de konataj nomoj en la lasta-tempaj Belartaj Konkursoj. Esperantaj aŭtoroj, jam post la unua gajnita premio aŭ post la unua aperinta verko, konsideras sin sufiĉe konataj por ne plu konkursi. Kiom erara tia supozo estas, tion plej bone argumentas nia libro-merkato, kiu bezonas plurajn jarojn, ofte eĉ jardekojn, por konsumi kelkcentan eldonkvanton de originala verketo. La Belartaj Konkursoj certe ne estas destinitaj nur al la novicoj en nia literaturo, sed ili povus kontribui ankaŭ al plia popularigo de la jam konataj nomoj kaj tia maniere helpi ankaŭ la eldonan aktivecon en la movado.

BELARTAJ KONKURSOJ: REZULTOJ

Originala poezio (30 konkursaĵoj)

1. Nealjuĝita.
 2. Lina Gabrielli (Italujo): "La vivo savita".
 3. Eduard Tvarožek (Ĉeĥoslovakujo): "Dediĉo".
- Laŭda mencio: Ueyama Masao (Japanujo): "La dezerto en iluzio".

Tradukita poezio (23 konkursaĵoj)

Premioj nealjuĝitaj.

Originala prozo (26 konkursaĵoj)

1. Nealjuĝita.
 2. Andreo Szabó (Hungarujo): "Velko en printempo".
 3. Jo Haazen (Belgujo): "Roza".
- Laŭda mencio: Mihail Ŝekerĝiev (Bulgarujo): "La okuloj".

Originala dramo (8 konkursaĵoj)

1. Nealjuĝita.
2. Nealjuĝita.
3. Ludoviko Izák (Ĉeĥoslovakujo): "La venkinta Ikaro".

Nova Talento (Pokalo Harabaĝiu)

Kjell Walraamoen (Norvegujo): "Ĉe vi", originala poemo.

Amasa – kaj kontenta partopreno

En sude varma kaj vinplena urbo kiel Beograd, nura mencio de la distraj aranĝoj en la kongresprogramo ne povas doni ĝustan bildon. En multnombraj kafejoj daŭris ĝis profunda nokto diskutoj certe ne malpli esencaj, ol tiuj oficiale anoncitaj en la Kongresa Libro.

Ankaŭ la programo de la 58-a UK abundis je festaj kaj distraj aranĝoj, ne kalkulante tiujn, kiujn ĉiu kongresano prizorgas por si mem kaj per kiuj finiĝas ĉiu kongresa vespero.

S-ro Branko Pešić, prezidanto de la Magistrato de Beograd aŭ – la urbestro de la jugoslavia ĉefurbo (kiel oni pli populare diras), akceptis 200 gekongresanojn, kiuj reprezentis ĉiujn Landajn Asociojn, la Estraron kaj Komitaton de UEA, fakajn kaj aliajn organizaĵojn, kiuj reprezentigis en la Kongreso. La akcepto, kvankam en pompa urbodoma ejo, pasis en tre neformala etoso, al kio pleje kontribuis la urbestro mem, kiu pasigis pli ol unu horon en tre spontanea konversacio kun la kongresanoj.

Reprezentantoj de kelkaj Landaj Asocioj havis

La kvarteto "Esperanto" el Ĉeĥoslovakujo kontribuis siajn amplifitajn agordojn ankaŭ al la Kongresa Balo, kies larĝaj ejoj tamen permesis al la nedancemaj same agrablan konversadon, kiel al la ceteraj la dancadon.



apartajn akceptojn en sialandaj ambasadoj. Nin atingis informoj, ke tiaj akceptoj okazis en la aŭstra, dana, germana (FR) kaj japana ambasadoj.

La tradicia INTERKONA VESPERO ĉi-jare montriĝis esti ankaŭ unu el tiuj mamutaj kongresaj aranĝoj, kiujn partoprenas preskaŭ la tuta kongresanaro. La organizantoj verŝajne ne kalkulis pri tio, kaj la sekvo estis, ke ĉiuj ejoj de la restoracio "London" montriĝis iom malgrandaj. Tamen, la vespero bele evoluis, ĉar oni eble ĝuste pro la spacomanko fojfoje eĉ devis konatiĝi kun personoj, kiuj ĉe sia tablo disponis pri libera loko. En unu el la salonoj estis ludata dancmuziko, kaj baldaŭ ĝuste tie kreiĝis vere vigla kaj amika etoso, kiu daŭris eĉ iom post la oficiala fermhoru de la restoracio.

LA BANKEDO okazis en la unuaklasa hotelo "Metropol", kiu ne povis akcepti pli ol 350 festenulojn, kvankam lastmomente montriĝis, ke la intereso estas multe pli granda. La partoprenintoj de la bankedo raportis, ke ili estis tute kontentaj ne nur pri la servitaj delikaĵoj, sed ankaŭ pri la servo mem, kio en Beograd ne estas tro ofta kazo.

Samtiel en la hotelo "Metropol", cetere tre proksima al la kongresejo, tuj post la bankedo okazis ankaŭ LA OFICIALA KONGRESA BALO. Tiu ĉi aranĝo logis pli ol 1000 gekongresanojn, kiuj ĝis malfrue en la nokto ĝuis unu el la plej sukcesaj tiaspecaj aranĝoj dum la lastatempaj kongresoj. Ne nur ke konvenis la modernaj kaj komfortaj salonoj de "Metropol", sed oni povis ĝui la muzikadon de du orkestroj, kies repertuaro ŝajne sukcesis kontentigi ĉiujn ĉeestintojn: la beograda cigana orkestro kontentigis la romantikemulojn, kaj "Kvarteto Esperanto" el Ĉeĥoslovakujo zorgis pri tiuj kun pli moderna gusto.

En ĉi tiu numero aperas plurloke fotoj faritaj de s-ro Davor Grgat (Paiceva 21/I, YU-58000 Split, Jugoslavio), kiu cetere fotis tre multajn kongresanojn en Beograd. La fotitoj povas mendi siajn fotojn po unu guldeno aŭ egalvaloro, plus sendokostoj, rekte ĉe s-ro Grgat.

Tio tamen ne estas TEJO

La fakto, ke la Internaciaj Junularaj Kongresoj de TEJO ĉiam okazas tuj antaŭ aŭ tuj post la Universalaj Kongresoj — havas nete negativan efikon al la kvalito de la junularaj aranĝoj en la kadro de tiuj lastaj. Beograd ne estis escepto tiurilate: ĉiuj junularaj aranĝoj en la kadro de la Kongreso estis palaj, malmultnombraj, neviglaj (kun eventuala escepto de la Junulara Vespero), erara bildo de la forto kaj nivelo de TEJO, — ĉio ĉi tute kontraŭa al la brila 29-a IJK (tiam ĵus finiĝinta en Sarajevo), pri kiu ni raportos detale en la oktobra n-ro de la revuo. Cetere, la tuta koncepto de la t.n. "Junulara Tago" en la Universalaj Kongresoj devus grave ŝanĝiĝi, ĉar ankaŭ ĉi-jare ĝia programo enhavis 19 nejunularajn, kompare al 6 junularaj, aranĝojn, el kiuj unu prokrastiĝis por posta tago.

Al la unua tiutaga junulara programero, kiam la nova prezidanto de TEJO, d-rino Flora Szabó-Felső, kaj s-ro G. Matte informis pri la junulara organizo ĝenerale kaj aparte pri la rezultoj de la 29-a IJK, venis nur trideko da personoj. La dua aranĝo — publika debato pri la temo "Junularo — lingvo — politiko" — logis ĉ. 150 gekongresanojn, el kiuj dudeko partoprenis la diskuton, plej ofte tuŝante la temon nur hazarde aŭ supraĵe. Ankaŭ en Beograd oni aranĝis renkontiĝon kun la loka junularo, kio okazis en la kadro de vizito al la entrepreno "Trudbenik", kie ĉ. 35 vizitantoj konatiĝis kun la evoluo de la entrepreno kaj, aparte, kun la junulara vivo tie kaj ĝia partopreno en la organoj de la laborista mem-administrado. (Tiajn vizitojn en la kadro de la 29-a IJK oni faris al pluraj sarajevaj entreprenoj). La Junulara Vespero estis sukcesa aranĝo, eble ĉefe pro tio, ke tiaj aferoj apenaŭ havas ŝancon malsukcesi. Ĉar, se oni al gejunuloj disponigas belan ejon kaj bonkvalitan muzikon — tio certe sufiĉas por havi agrablan vesperon. Cetere, la Junulara Vespero havis plian favoraĵon de la sorto ĉi-jare: samtempe en la kongresejo okazis la Varia Vespero, kaj la gejunuloj estis liberigitaj de troaj geonkloj, kiuj en la antaŭaj

kongresoj ofte estis pli multnombraj en tiaj aranĝoj ol la junularo mem.

Kompreneble, oni povus laŭdi la prizorgintojn de la Junulara Tago en Beograd, ĉar ili tamen faris amason da penoj por sukcesigi la tuton. Tiu, kiun oni ĉi tie mallaŭdu, estas TEJO mem, kiu la junularajn aranĝojn en la Universalaj Kongresoj devus trakti multe pli serioze kaj ne permesi, ke ĝia tuta forto iru al la organizo de IJK-oj. TEJO devus kompreni, ke ĝuste la Universalaj Kongresoj estas la loko, kie ĝi plej efike povus eksponi siajn ideojn, gajni simpatiojn, patronajn membrojn kaj alispecan subtenon. Se TEJO celas plijunigi la ĝeneralan Movadon, persone kaj ideo, ĝi devus pruvi siajn kapablojn kaj kapacitojn ĝuste en la kadro de la junularaj aranĝoj dum la Universalaj Kongresoj.

LA SOLENA FERMO:

La lasta akto

La ferma kunsido de ĉiu nia kongreso estas ambigua rilate la humoron: ĝi portas ĝojon al la organizantoj kaj ceteraj oficialuloj (ĉar ili rimarkas, ke tiu "infero" tamen havas finon), kaj — malgaja ĝi estas por tiu plimulto, kiu ĝuas la kongresojn kaj jen — devas adiaŭi malnovajn kaj novajn geamikojn, stratojn, kiuj komencas esti konataj, hejmiĝantajn kafejojn kaj — la solan mondan regnon de la senprecedenca lingva egalrajteco. La Solena Fermo de la 58-a UK en Beograd ne estis escepto tiurilate.

En la granda salono de la Sindikata Domo kolektiĝis iom malpli ol mil gekongresanoj. La solenaĵon malfermis prof. d-ro B. Popović, vicprezidanto de la Asocio, donante la parolon al la ĝenerala sekretario de UEA, s-ro Günther Becker, kiu informis la ĉeestantojn pri la plej gravaj kongresaj laboroj. Post tio oni tralegis la Kongresan Rezolucion, kiu estis unuanime akceptita, kaj kiun vi trovas aliloke en ĉi tiu n-ro de la revuo. S-ro S. MacGill informis pri la ĵus okazinta 29-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Sarajevo; s-ino E. Lapenna proklamis la rezultojn de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj; s-ro R. Bernard proklamis la gajnintojn de la premioj en la Oratora Konkurso.

Kiam s-ro E. Carlén, vicprezidanto de UEA, transprenis la prezidadon de la solenaĵo, li diris, interalie, jenajn vortojn: "Je la fino de la Kongreso mia koro plenas je dankemo, unue al la Alta Protektanto de la Kongreso, la Prezidanto de Jugoslavio, s-ro Josip Broz Tito, kaj mi proponas, ke la Kongreso sendu al li telegramon." La ĉeestantaj kongresanoj akceptis la proponon kun aplaŭdo. S-ro Carlén plue dankis al la membroj de la Honora Komitato, al la Magistrato de Beograd kaj al ĉiuj kunlaborintoj en LKK kaj unuopaj kongresaj aranĝoj, menciante plurajn nomojn de la plej fervoraj aktivuloj.


Post kelkaj teknikaj informoj venintaj de la direktoro de la C.O. de UEA, d-ro W. Bormann, prezidanto de LKK de la 59-a UK en Hamburgo, kelkvorte prezentis la gastigantan urbon de la venontjara

Meditas TEJO-
gvidantoj (de
maldekstre)
Flora Szabó,
Renato
Corsetti, Senad
Čolić kaj
Claude
Nourmont —
ĉu pri pli-
bonigo de la
Junulara Tago?



Kongreso kaj kore invitis al partopreno en Hamburgo. La ferman kunsidon plisolenigis la ĉeesto kaj saluto de d-ro Ahrens, kultura ataŝeo en la Ambasadro de FR Germanujo en Beograd. Li lernis la Esperantan prononcon tuj antaŭ la Solena Fermo kaj brile sukcesis alparoli la kongresanojn en la Internacia Lingvo. Interalie li diris: "Vi havis bonan Kongreson en Beograd. La oficialaj instancoj kaj la publiko grandskale donis la atenton, tiel gravan por la sukceso de Esperanto-movado..... Mi esperas kaj mi estas konvinkita, ke vi povos labori same sukcese, kaj ankaŭ esti denove same gajaj en mia lando, en Hamburgo. Vi povas certe kalkuli pri la germana gastameco. Mi kore deziras sukceson por la laboro de la internacia Esperanto-movado, al kiu mia ministro, kiel vi scias, dediĉas specialan atenton."

Sekvis la lasta akto — mallevo de la granda Kongresa Flago, tiu impona ornamaĵo kaj la plej fidela partoprenanto de ĉiuj Universalaj Kongresoj dum preskaŭ tridek lastaj jaroj. Tuj antaŭ ol la prezidanto de LKK, prof. inĝ. M. Šaponjić, lastfoje alparolis la kongresintojn (kion, kompreneble, sekvis la himno), okazis belsimbola evento: la 14-jara LKK-ano de la 59-a UK, Thomas Bormann, solene transprenis la Kongresan Flagon por porti ĝin al Hamburgo.



Nur fine de la Kongreso povis malstreĉiĝi en festeta atmosfero la membroj de la Loka Kongresa Komitato kaj de la Estraro de UEA. De dekstre: prof. B. Popović, s-ino J. Šaponjić, s-ro E. Carlén, s-ino Carlén, prof. M. Šaponjić kaj d-ro W. Bormann.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 470, 1973-08-01

Atentu la novajn kotizojn por 1974

Valuto	MJ	MA MA-K	MS	J-MJ	J-MA SA	K-to	Pat.A	Pat.B
Pundo brita	2,80	5,60	8,40	1,40	4,20	1,50	3,—	1,—
Dolaro aŭstr./NZ; rando sudafrika	5,40	10,80	16,20	2,70	8,10	2,90	5,80	1,80
Dolaro usona/kanada	7,—	14,—	21,—	3,50	10,50	3,75	7,50	2,40
Guldeno/marko FR-germana	20,—	40,—	60,—	10,—	30,—	11,—	22,—	7,—
Franko svisa	24,—	48,—	72,—	12,—	36,—	13,—	26,—	8,—
Marko finna	26,—	52,—	78,—	13,—	39,—	14,—	28,—	9,—
Pundo israela	28,—	56,—	84,—	14,—	42,—	15,—	30,—	9,—
Krono sveda; bolivaro venezuela	30,—	60,—	90,—	15,—	45,—	16,—	32,—	10,—
Franko franca	34,—	68,—	102,—	17,—	51,—	18,—	36,—	11,—
Kruzejro	36	72,—	108,—	18,—	54,—	19,—	38,—	12,—
Krono norvega; int. resp.-kupono	40,—	80,—	120,—	20,—	60,—	21,—	42,—	13,—
Krono dana	44,—	88,—	132,—	22,—	66,—	23,—	46,—	15,—
Dinaro	100	200	300	50	150	53	106	33
Krono ĉeĥoslovaka	114	228	342	57	171	—	—	—
Ŝilingo aŭstra	140	280	420	70	210	75	150	50
Eskudo	160	320	480	80	240	85	170	60
Draĥmo	200	400	600	100	300	110	220	70
Franko belga	280	560	840	140	420	150	300	100
Solo perua	380	760	1140	190	570	200	400	130
Peseto hispana	400	800	1200	200	600	210	420	140
Eno japana	2000	4000	6000	1000	3000	1100	2200	700
Liro itala	3800	7600	11400	1900	5700	2000	4000	1300

MJ = Membro kun Jarlibro
MA = Membro-Abonanto
MA-K = Membro-Abonanto kun "Kontakto"
MS = Membro-Subtenanto
J-MJ = Juna Membro kun Jarlibro

J-MA = Juna Membro-Abonanto
SA = Simpla Abonanto de la revuo "Esperanto"
K-to = Abonanto de "Kontakto"
Pat. A = Patrono "A" de TEJO (kiu ricevas interalie "Kontakto"-n)
Pat. B = Patrono "B" de TEJO (kiu ricevas aliajn materialojn)

Oficiala informilo

PAGOJ PER GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

La membroj en FR Germanujo estas petataj de nun adresi siajn kotizpagojn por UEA ne plu al la antaŭaj adreso kaj konto en Augsburg, sed al: Deutscher Esperanto-Bund e.V., 614 Bensheim, Postfach 253; pĉk Nürnberg 25 65-854.

NOVA ĈEFDELEGITO EN FR GERMANUJO

Germana Esperanto-Asocio nomis kiel novan Ĉefdelegiton de UEA por FRG s-inon Elisabeth Hirsch, D-643 Bad Hersfeld, Lambertstrasse 12; tel. (0 66 21) 49 95. Ĉar la kotizperadon prizorgas GEA mem, s-ino Hirsch okupiĝos ĉefe pri la delegita reto kaj pri varbado.

KOTIZPERANTO POR HISPANUJO

Kun bedaŭro ni sciigas, ke la Ĉefdelegito por Hispanujo, s-ro Ramon Molera, post 16-jara plej konsciencia kaj efika plenumado de tiu ofico, ekŝiĝis el ĝi. La membroj en Hispanujo estas petataj ne plu adresi al s-ro Molera siajn kotizpagojn kaj aliajn korespondaĵojn pri UEA. Baldaŭ ni anoncos la nomon kaj adreson de la estonta kotizperanto hispana. Al s-ro Molera ni varme dankas pro la longa kaj fidela kunlaboro kaj deziras al li pluan sukcesan agadon sur ĉiuj kampoj.

NOVA ISRAELA PERANTO

Estas nomita nova Peranto de UEA por Israelo: s-ro Israel Israeli, adreso: str. Hercel 98, Tel Aviv; tel. 82 00 10. La membroj en Israelo estas petataj estonte direkti ĉiujn pagojn al tiu adreso. Al la multjara ĝisnuna Peranto, s-ro J. Ben Alter — sinceran dankon pro la faritaj servoj al la Asocio!

ANONCTARIFO DE LA JARLIBRO

La ĝenerala altiĝado de kostoj necesigas altigon ankaŭ de la prezoj de anoncoj en la Jarlibro de UEA. La nova tarifo estas jena:

Tutpaĝa anonco.....	160,— gld.
Trikvaronpaĝa anonco.....	125,— gld.
Duonpaĝa anonco.....	90,— gld.
Kvaronpaĝa anonco.....	55,— gld.

Por mendoj jam faritaj validas kompreneble la antaŭaj prezoj.

DONACOJ 1973 (gld.)

Asocia Kapitalo: La sumo de "Asocia Kapitalo" fariĝas 1051,03 gld. pro transporto de la rento de Heredaĵo Engelŝer al konto 8100 (rentoj).

Ĝenerala Kaso: Aŭstrujo: S-ino G. Breunlich, 19,—. Svedujo: M. Persson, 3,95. Sumo ĝisnuna: 1106,02.

Kampanjo 100 x 100 (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum 3 jaroj ekde 1971 po 100,— gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj):

Sumo donacita por 1971: 5 300,— gld.

Sumo donacita por 1972: 6 600,— gld.

Sumo ĝis nun por 1973: 4 001,12 gld.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. respond-kupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas sole nur la anoncantoj.



Instruistlerneja studentino deziras korespondi kun eŭropaj gestudentoj. Ingrid Matland, 4200 Sauda, Norvegujo.

Fringo-leporo, kiel rilatas tiu stranga besto al kristana kulturlaboro? Respondas p.3 de senpaga libreto ĉe Esperanto-Misio, Box 7, Östansjö, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Pri mondkonceptaj, moraj kaj religiaj aferoj — precipe kun nekristanoj — deziras korespondi kristano-katoliko: Stanisław Pietrzak, ul. Krakowska 7, PL 33-350 Piwniczna, Pollando.

Se vi havas malnovajn Esperanto-librojn kaj revuojn kaj deziras vendi aŭ interŝanĝi ilin, skribu al: S-ro Ramon Molera - Sta. Joaquina, 13 - Moyá (Barcelona) - Hispanujo.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

Deziras aĉeti, interŝanĝi nudfotojn kun foto-amatoroj; Leif Heilberg, P.O. Box 22159, San Francisco, Ca 94122, Usono.

Letervesperon je la 28a de novembro aranĝas Esperanto - Societo Keighley. Skribu al: B. Najbaro, 2 Mackingstone Drive, Oakworth, Nr. Keighley, Yorks., Anglujo, BD22 0RL.

66-jara kuiristo-restoracimastro emerita, posedanta monon en banko, 1 m 55, svelta, dez. kor. kun sinjorino, celante feliĉan kuniĝon: Joseph Schlienger, 9 rue du Fossé, F 68700 Cernay, Francujo.

S-ino Juta Mannermaa, USSR, Estonio, 202900 Viljandi, str. Põllu 7, deziras korespondi kun la tuta mondo pri naturo, popolkutimoj, vivnivelo ktp.

Mi deziras korespondi kun tuta mondo kaj kolektas ĉiujn esperantaĵojn, precipe glumarkojn. Respondo garantiata. Mi bone rekompencos je via deziro. Richard Wluka, D-3 Hannover-Leinhausen, Bremer Str. 8.

En multaj landoj 2% de la enloĝantaro suferas pro la ne-infekta haŭtmalsano psoriazo. La adreso de ĉiu landa asocio por suferantoj estas havebla de: The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, Anglujo.

Eseo pri politikaj, historiaj, juraj kaj filozofiaj aspektoj de milito. Temoj: neŭtraleco, internaciismo, pacista edukado, mond-civitaneco, mondregistaro, internacia kodo, ktp. 212p., 15 cm. Prezo: 12,75 gld.



* * * * *

Aliaj verkoj ĵus eldonitaj de Argentina Esperanto-Instituto, C.C.58, Suc. 12, Buenos Aires (Argentino)

BONHUMORA INJEKTILO, 120 amuzaj anekdotoj kaj spritaj dialogoj, de Ergoto de Bonaero. 192p. 17 cm. Prezo: 12,75 gld.

LA FRIPONETO DE TORMES (pikareska novelo) 72 p. 17 cm. Prezo: 6,36 gld.

Mendu ilin ĉe UEA

Ĵus aperis N° 1 de

LA TORNISTRO

(por instruo kaj por distro)

Literatura jarkajero kun tre varia enhavo: artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, ktp., kun multaj ilustraĵoj.

52 paĝoj — 22 cm. Prezo: 5 gld.

Mendu ĉe UEA, aŭ ĉe Argentina Eo-Instituto, C.C. 58, Suc. 12, BUENOS AIRES (Argentino)

POR KUNE — FRATE — GLORE . . . KAJ ĈI-JARE

konkludi nian komunan bonfarecan iniciaton rilate al la “Pavilono Esperantista Frateco” por 48 hindaj, Madrasaj lepruloj, ni bezonas nur ĉirkaŭ 400 usonaj dolaroj. Favore al Pavilona Fonduso ni disdonos al monoferantoj (pogrande aŭ podetale) du belegajn esperantistajn kantojn: 1. *Donu al mi vian manon* — Teksto kaj melodio de Ramona van Dalsem. 2. *Himno de la eŭropaj federistoj* — Versoj kaj muziko de D-ro Alberto Menabene, traduko el itala lingvo de D-ro Luigi Minnaja. Bonvolu skribi al eldonanto: Rev. Peter Urbaitis S.D.B., Vytėnai, Lituani Don Bosco, Via Colonna, 2 (Tel. 940.507), I-00044 FRASCATI - Roma, Italujo.

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

“Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj”

faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852), Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

Ĉu vi konas la kultur-revuon

NORDA PRISMO?

Se ne; petu provnumeron!

Se jes; abonu kaj igu aboni ĝin!

Jarkolekto: 25 d. kronoj.

Mendo: P. B. 952, DK 2400 NV.

Pago: Per ĝirkonto 905 55, DK.

aŭ per Landmandsbanken, DK 2900.

1973

Dek-oka jaro

La Monda Lingvo-Problemo

Socia-Lingvistika-Politika-Jura

Psikologia-Ekonomika

Vol. 4 (1972) N-ro 12

Jacques POHL, D mo-linguistique et probl mes des langues

Lachman M. KHUBCHANDANI, Planned change in the media of instruction: Problems of switch-over
W.A. VERLOREN van THEMAAT, Literature in a constructed language

Richard E. WOOD, Proceedings of the Symposium on the Teaching of Esperanto at United States Universities and Colleges

W.A. VERLOREN van THEMAAT, On machine translation (Recenzo)

Arthur CAPELL, Grundfragen der Ethnopolitik im 20. Jahrhundert (Recenzo)

Plus ampleksaj resumoj en Esperanto

Eldono de Mouton sub a spicio de CED

Mendu per UEA

Jarabono (3 x 64 p.) kostas 25,  gld.

Ankora  haveblaj: vol. 1 (1969), n-roj 1-3; vol. 2 (1970), n-roj 4-6; vol. 3 (1971), n-roj 7-9.

Nun aperinta: vol. 4 (1972), n-roj 10-12.

Jam akceptataj estas la abonoj anka  por vol. 5 (1973), n-roj 13-15, kaj por la postaj volumoj.

3-A VINTRA ESPERANTISTA FERIO EN BUDAPE TO

28.12.1973   02.01.1974

El la programo:

URBORIGARDO, VIZITOJ EN MUZEOJ,
ESPERANTO-SEMINARIOJ, TUTTAGA
EKSKURSO PROVINCON,

INTERNACIA SILVESTRA BALO, ktp

Kvarkoloran, 16-pa an

programkajeron kun invitulo

senpage sendas la organizanto:

Buda sta Teritoria Komitato de HEA

1443, Budapest, Po tkesto 153

ELDONISTOJ DE PERIODA OJ:


Ni komencas globskalan mendservon, precipe por usonaj abonantoj. Ni celas pligrandigi la legadon de  iuj niaj perioda oj.

Ni planas grupigi la mendojn, kiel eblas, kaj transsendi ilin kune al vi. Bv. plenumi la mendojn tuj. Ni dependos je vi por la kalkulado de via fakturo,  ar viaj prezoj kaj aliaj aran oj eble  an i is. Ni estos finance respondecaj al vi kaj niaj abonantoj.

Kelkaj ekzempleroj de viaj eldona oj estus bonvenaj, kiel specimenoj por interesuloj. Anta dankon!

S-ro R. Kent Jones, Estro
ESPERANTA LINGVA SERVA KOMPANIO
3318 N. Lake Shore Drive, N-ro 801
Chicago, Illinois 60657, Usono.

NENIAM PLU ZORGOJ



La moderna vivo forrodas la nervojn, malsimpligas la simplajn aferojn de la vivo, malhomigas la homon . . . Petskriboj, formularoj, limdatoj, kotizoj   kiom pli paca estus nia vivo sen tiaj burokrata oj! Kaj tamen necesas rekoni, ke ili donas al ni avanta ojn. Per sia  iujara kotizo la individuaj membroj de UEA restas en proksima kontakto   dank' al la revuo kaj jarlibro   kun la tutmonda Esperantomovado. Valoras la penon retrovi la tarifon, skribi pagilon, leteron, formularon, forsendi  ion, atendi Sed vere tio ne necesas! Se vi fari os dumviva membro, vi ne plu bezonos  iujare rememori pri tiaj aferoj. Paginte en unu fojo la egalvaloron de 20-foja kotizo de Membro-Abonanto, vi neniam plu havos zorgojn pri via membreco, e  se vi fari os 100-jara. Kaj ne pensu nur pri via propra trankvileco! Faru plezuron anka  al la oficistoj de UEA, kiuj neniam plu bezonos memorigi vin nek  iujare enkontigi vian pagon! Sed jen la definitiva argumento.   Por 1974 la kotizoj devos alti i (en guldenoj) je unu triono. Anka  la kotizo de dumviva membro. Se vi pagos la kotizon de dumviva membro anta  la fino de la jaro 1973, vi tamen bezonos pagi nur 20-oble la MA-kotizon de 1973, tio estas 600,  guldenoj. Jen rimedo por venki la inflacion!

Fari u NUN dumviva membro de UEA!